

EL POPOLA ĈINIO

中國新道

9
1997

ISSN 0032 - 4361



Ĉu sismo prognozeblas?

La Nanning-Kunming-a Fervojo

"Morgaŭ mi fariĝos
novedzino"



Mateno

Foto de LIU SIGONG

INTER NI

La ekonomia disvolviĝo de Ĉinio ŝanĝis la popolan vivon. Tial ni ofte raportas pri tio al niaj legantoj. En la rubriko "Ekonomie" en tiu ĉi numero leĝiĝas la artikolo "La Nanning-Kunming-a Fervojo". La nomita fervojo iras en sudokcidenta Ĉinio postĝinta kaj fermita dum longa tempo pro altaj montoj. Antaŭ la inaŭguro de la Nanning-Kunming-a Fervojo multaj lokanoj neniam vidis trajnon. Pro manko de trafikaj rimedoj la fruktoj kaj legomoj kulturitaj de tieaj kamparanoj ofte putris en kampoj, por ne paroli pri utiligo de subteraj riĉfontoj. Kaj kare kostis la ĉiutagaj necesajoj alportitaj per kamionoj kaj ĉevalĉaroj. Do, ne estas senkaŭze, ke la lokanoj diversnaciaj ĝoje festis la inaŭguron de la fervojo, kantante kaj dancante, akompanate de gongado kaj tamburado.

La artikolo "En Lhasa ne mankas fre-

ŝaj legomoj" konigas, ke antaŭe Lhas-anoj, pro aĉaj naturaj kondiĉoj, neniam kulturis legomojn nek havis la kutimon manĝi ilin. Sed nun ili tutforte disvolvas legom-kulturadon. Tio alportas evidentan avantaĝon al la lokanoj.

La tertremo okazinta en Tangshan, Ĉinio, antaŭ 21 jaroj estas neforgesebla por la ĉinoj. Laŭ analizo de fakuloj, ĉe la fino de la kuranta jarcento la loko estos en sismoaktiva periodo. Por laŭeble redukti tiuflankan perdon, ĉinaj sciencistoj multe studas pri prognozo de tertremo kaj la kontraŭrimedoj, kion prezentas la artikolo "Ĉu sismo prognozeblas?".

Laŭ peto de iuj legantoj ni aperigas en tiu ĉi numero artikolon pri reordigo de antikvaj libroj de ĉinaj nacimalplimulto.

La Red.

El Popola Ĉinio

9 [468] 1997




La Nanning-Kunming-a Fervojo
Foto de Zhao Huaqiang

La 18-an de marto 1997 estis finita la trakosternado de la Nanning-Kunming-a Fervojo en Guizhou-provinco.

EL POPOLA ĈINIO
Monata gazeto, eldonata de Ĉina Esperanto-Ligo
Redaktata de Redakcio de "El Popola Ĉinio"
Distribuata de Distribua Fako de "El Popola Ĉinio"
Direktoro: Hou Zhiping
Adreso: P.O.Kesto 77, Beijing 100037, Ĉinio
Telefono kaj telefakso: +86-10-6832 1808

ENHAYO

- | | | | |
|----|---|----|---|
| 2 | INTER NI | 38 | EL ĈINAJ GAZETOJ |
| 4 | Ĉu sismo prognozeblas? | 40 | Antikvaj libroj en rapida reordigo |
| 6 | EKONOMIE: | 42 | ĈINA KULTURO: |
| | La Nanning-Kunming-a Fervojo; Kurantaj aferoj | | Ceremonio kaj moro pri teo |
| 11 | De "fare de" al "far" | 44 | ORDINARAJ ĈINOJ: |
| 13 | ESP-NOVAĴOJ | | Vilaĝa fotisto |
| 14 | Proverboj pri infanoj | 46 | Instruistoj en infanĝardenoj |
| 16 | JUNULARO: | 48 | Avineto de infano-leŭkemiuloj |
| | "Morgaŭ mi fariĝos novelczino" | 49 | Ĉina uŝuo tutmonde |
| 18 | La templa urbo Hohhot | 50 | POR VIA SANO: |
| 20 | POR KOMENCANTOJ: | | 20 sanigaj ekzercoj (V) |
| | Eksterordinara hundeto; Fidela al domo | 51 | ĈINAJ METIARTAĴOJ: |
| 21 | NUNTEMPA BELARTO: | | Chang'e flugas al la luno |
| | "Animo de lako" kaj "Spirito de pentraĵo" | 2 | Mateno |
| 24 | EN ĈINAJ URBETOJ: | | SUR LA DORSKOVRILO: |
| | "Strato de alilandanoj" | | [FOTOJ FARITAJ DE E-ISTOJ] |
| 28 | En Lhasa ne mankas freŝaj legomoj | | Nebridebla printempo en Danio; Czestochowa en printempo |
| 29 | LAŬ LA SILKA VOJO: | | |
| | Vento en Dabancheng | | |
| 36 | ORIGINALE VERKITAJ: | | |
| | Poemoj | | |



Lokoj menciitaj en ĉi tiu numero

- | | |
|--------------------------|--------------------|
| 1. Lhasa (p.28) | 2. Yangshuo (p.24) |
| 3. Nanning (p.6) | 4. Kunming (p.6) |
| 5. Jiashi-gubernio (p.4) | |



En la sismoprogronezo de la Ŝtata Sismologia Buroo de Ĉinio

SHU MEI:

Ĉu sismo prognozeblas?

DE januaro ĝis aprilo ĉi-jare sinsekve okazis pli ol 4 400 fortaj kaj malfortaj sismoj en Jiashigubernio, Xinjiang (Ŝingĵang), Ĉinio. La malgranda gubernio tuj alvertis al si publikan atenton en Ĉinio. El la sismoj de Jiashi oni asociis, ĉu la urbo de li loĝata estas sekura aŭ ne.

La maltrankviliĝo ne estas senkaŭza. Laŭ la analizo de sismologoj la ĉeftero de Ĉinio troviĝas en la 5-a aktiva periodo de sismo, kiu probable daŭros ankaŭ en la venonta jarcento. En la periodo sismoj ondiĝas kaj iom post iom atingos sian kulminon. Situante inter la sismo-zonoj de Eŭropo kaj Azio, Ĉinio estas unu el la plej sismoriĉaj landoj en la mondo. En la 20-a jarcento pli-ol-7-gradaj sismoj okazintaj en la ĉeftero de Ĉinio konsistigis ĉ. 1/3 de la samgradaj sismoj de la mondo kaj ĉ. 550 000 homoj mortis de ili, t.e. 53% de la totala mortokvanto de la mondo ĉirilate. Preskaŭ ĉiuj ĉinaj provincoj kaj municipoj troviĝas en sismoaktiva areo.

Sismoj estas neeviteblaj. Oni zorgas, ĉu estos ebleco prognozi ilin kaj redukti ilian detruon al minimuma grado. Laŭ la ĉinaj cirkonstancoj tio ne estas neefek-

tivigebla. En 1975 en la urbo Haicheng de nordorienta Ĉinio okazis 7.3-gradaj tertremo. Dank' al la preciza prognozo far la sismologia departemento la loĝantoj de la urbo sukcese evakuis sian loĝlokon antaŭ la sismo. Laŭ la posta prialkulo de fakuloj la tertremo de Haicheng evitigis morton minimume al 100 000 homoj. Poste la ĉina sismoprogroneza departemento faris aliajn du precizajn prognozojn. Kiam oni estis plene konfidaj al sismoprogronado, okazis pli forta tertremo en Tangshan en 1976. En momento la urbo komplete ruiniĝis kaj 240 000 homoj mortis. La subita katastrofo rompita la konfidon al sismoprogronado. Multaj ne komprenis, kial la sismoprogroneza departemento ne antaŭsciis la sismon de Tangshan, se ĝi ĝuste prognozita tiun de Haicheng. Chen Zhangli, estro de la Ŝtata Sismologia Buroo de Ĉinio, klarigis, ke fakte prognozo de sismo estas 4-speca, t.e. tiu el periodoj longa, meza, mallonga kaj tuja. Nun ĉinaj sismologoj kompare bone faras la prognozojn long- kaj mezperiodajn. Ili ankaŭ faris long- kaj mezperiodajn prognozojn pri la sismo de Tangshan, sed ne la tujan. En la komenco de tiu ĉi jaro oni klare atentigis en iu landa sismologia simpozio, ke en

tiu ĉi jaro en Tangshan eble okazos 5-6-gradaj tertremo. 1-2 monatojn antaŭ la sismo, en Pekino, Tianjin, Tangshan kaj iliaj ĉirkaŭaj lokoj okazis sinsekve iuj eksterordinaraj fenomenoj. La sismologia departemento plurfoje faris esploron ĉeloke por konstati la fenomenojn. Tamen fakte la sismo de Tangshan okazis sen prognozo. Tio montris, ke la nivelo de nia tuja sismoprogrono ankoraŭ ne estas alta.

Tamen, la sismo de Tangshan donis nemal multe da valoraj materialoj por la ĉina sismoprogrono kaj en ia senco ĝi akcelis perfektigon de la ĉina sismoprogrona laboro. Post la sismo de Tangshan ĉinaj sismologoj faris serion da esploroj pri kazoj, aŭspiciaj trajtoj, prognozaj rimedoj kaj formiĝo de sismoj, starigis tutlandan reton de sismomonitoraj stacioj, kulturis sismologian trupon el 15 000 sismologoj, plenumis radiokomunikacion reton specialan por sismo kaj komencis konstrui specialan sismologian satelitan komunikacion reton. Dank' al tiuj instalaĵoj la ĉina sismologia departemento povas fari rapidan determinon pri la enlandaj sismoj kaj ankaŭ pri alilandaj sismoj.

Oni povas diri, ke la ĉina sismoprogrona laboro ja progresis en

la pli ol 20 jaroj post la sismo de Tangshan. Dum la tempo oni 10-foje faris precizan prognoron pri la mallongperiodaj kaj tujaj tertremoj pli-ol-6-gradaj. Pri la sismoj okazintaj ĉi-jare en Jiashi ĉinaj sismologoj faris 3 precizajn prognozojn pri pli-ol-6-gradaj sismoj. La 5-an de aprilo aperis evidenta kvieto en Jiashi post sinsekvaj pli-ol-4-gradaj sismoj. Laŭ tiu fenomeno la Sismologia Buroo de Xinjiang opiniis, ke kredeble okazos 5-6-gradaj sismo en la estonta semajno. Laŭ la prognozo la pli ol centmil loĝantoj tuj transloĝiĝis en provizorajn domojn. Tuj post la transloĝiĝo okazis 6.3-gradaj sismo.

La sismologoj ne estas blinde optimismaj pri siaj sukcesoj de la prognozado de tuja sismo. Ĉar sismoj okazas sub tero profunda je 10-15 km, oni ne povas "eniri" en sismofonton por fari esploron, tial ĝis nun la sismoprognozo estas farata ĉefe surbaze de spertoj kaj scienca sismoprognozo atendas longan esploron. Ĉina sismologo s-ro Zhang Guomin diris: "Nun ni povas fari prognozon pri iuj sismoj sub avantaĝaj kondiĉoj, ke en la loko estas tre koncentriĝa monitora reto, kiu kovras la sismofonton, kaj multaj materialoj pri antaŭaj sismoj, terkrusta strukturo, danĝere-

co k.a., kaj krome sciencistoj okupiĝantaj pri tiu laboro estas fortaj en analizado kaj juĝado, ktp."

Evidente, estas ne sufiĉe meti la kontraŭsisman esperon sole sur sismoprognozadon. Sekve, en la lastaj jaroj Ĉinio alprenis ankaŭ aliajn rimedojn por prognozi sismojn. Unue pliigi la kontraŭsisman kapablon de la konstruaĵoj. Koncernaj materialoj konigas, ke vundoj, mortoj kaj ekonomiaj perdoj pro sismoj kaŭziĝas ĉefe de disfalo kaj detruado de domoj, konstruaj instalaĵoj kaj ekipaĵoj. Por redukti la perdon la ĉina registaro decidis, ke en ĉ. 10 jaroj la grandaj kaj mezgrandaj urboj kaj regionoj dense loĝataj kaj ekonomie disvolviĝintaj havu kapablon rezisti kontraŭ pli-ol-6-gradaj sismoj. La celo estas efektivegebla, ĉar oni bezonas pliigi nur 3-5% investojn al la ordinaraj domoj en la konstruado por levi la rezistecon.

Krome, ĉar oni povas facile atingi altan precizecon pri mez- kaj longperiodaj sismoprognozoj, kio povas servi kiel materialoj por ellabori "urĝajn antaŭrimedojn kontraŭ sismo". Nun en Ĉinio estas 23 provincoj, 15 provincaj ĉefurboj kaj centraj urboj, kiuj ellaboris "urĝajn antaŭrimedojn kontraŭ sismo". Kaj en la lastaj du jaroj en Ĉinio

okazis 7 mezgradaj kaj fortaj sismoj kaj la lokaj registaroj ĉiu alprenis la urĝajn antaŭrimedojn. En majo 1996 en Baotou de Interna Mongolio okazis 6.4-gradaj sismo. Antaŭ la sismo la loĝantoj rapide evakuis hejmon laŭ la vojoj antaŭe difinitaj kaj tiel la perdo estis laŭeble malpliigita. En tiu industria urbo kun 2 milionoj da loĝantoj mortis nur 26 homoj de la sismo. Menciindas, ke post la sismo en Baotou oni rapide kaj laŭorde evakuis sian loĝlokon, dank' al popularigo de sismaj scioj far la lokaj sismologoj en ordinaraj tagoj. Estro de iu elementa lernejo rememoris: "Kiam okazis sismo, ĉiuj pordoj de la klasĉambroj malfermiĝis kaj la lernantoj unu post alia malsupreniris laŭ la ŝtuparo de la instrua domo al la placo. Ĉar ili sciis, kio estas sismo kaj kiuj lokoj estas sekuraj, tial ili neniom konsterniĝis."

En Ĉinio cirkulas popoldiro "Pro bona preparo ne estas granda perdo". Tiel statas ankaŭ ĉe sismo. Ĉiuj ĉinoj, kiuj scias pri la sismo de Tangshan, nun ankoraŭ sentas timon. Estas neimageble, se denove okazos tiel grava katastrofo. Oni esperas, ke disvolviĝos sciencoj kaj teknikoj, kaj ke iutage la homaro malkovros ĉiujn sekretojn de sismo antaŭ ĝia okazo. ■

Kunveno pri sismo-prognozo



La Nanning-Kunming-a

Teksto de YUAN MENG

Fotoj de ZHAO HUAQING

LA 898.7-kilometra Nanning-Kunming-a Fervojo estis lanĉita sur la Yunnan-Guizhou-a Altebenaĵo. Ĝi estas alia fervoja arterio en sudokcidenta Ĉinio, post la Chengdu-Kunming-a Fervojo. Ĝi etendiĝas de Nanning, ĉefurbo de la Guangxi-a Ĝuang-nacia Aŭtonoma Regiono, al Kunming, ĉefurbo de

Yunnan-provinco, tra 19 gubernioj kaj urboj de Guangxi, Guizhou kaj Yunnan. Ĝia jara transporta povo nun estas pli ol 10 milionoj da tunoj kaj estonte almenaŭ 20 milionoj. Ĝia finkonstruiĝo montras per si mem, ke realiĝis la revo, ke en sudokcidenta Ĉinio estas malfermita vojo al oceano.

De la 50-aj jaroj estis konstruitaj en sudokci-

Oni festas trak-sternadon ĉe montvilaĝo.



Fervojo

denta Ĉinio la Fervojoj Chengdu-Chongqing-a, Chengdu-Kunming-a kaj Guiyang-Kunming-a. Tamen la konstruado de la Nanning-Kunming-a Fervojo estis multe pli malfacila ol tiu de la supre menciitaj.

Ĝi transiras la Basenon de Nanning kaj Yunnan-Guizhou-an Altebenaĵon. En distanco de pli ol 800 km la trajno devas iri de loko 76 m al tiu pli ol 2 000 m super la marnivelo. En la regiono, trairata de la fervojo, multas lafoj kaj gasaj karbo-formacioj kaj ofte okazas serioza terŝoviĝo kaj kotŝtona fluo. Krome, tie sterniĝas tertrema zono kun longo de 242 km.

Por la fervojo oni konstruis 258 tunelojn kaj 476 pontojn. La totala longo de ili ambaŭ konsistigas 31% de tiu de la fervojo.

Konstrui la Nanning-Kunming-an Fervojon estis ĝojiga afero ankaŭ por la loĝantoj ambaŭflanke de la fervojo.

Kiam la konstruantoj sternis trakon en la gubernio Tianlin, Guangxi, kolektiĝis sur la konstruejo pli ol 10 000 scivolemaj kamparanoj, kiuj dumlonge vivis izolite en montaro. La gubernio riĉas je mineraloj, flaŭro, faŭno kaj karbo. Sed pro malfacila trafiko ili ne estas ekspluatitaj eĉ ĝis nun. Sendube, la lanĉo de la fervojo akcelos la disvolviĝon de ekonomio kaj ekspluatadon de riĉfontoj en la regiono.

En Yunnan-provinco multaj entreprenoj levigis ambaŭflanke de la fervojo. En la malriĉa sudokcidenta parto de Guizhou-provinco rapide disvolviĝas konstruado de bazaj instalaĵoj por telekomuniko, elektroproduktado k.a. En Beihai,



Trajno trapasos tiun ponton.

Foto de ZHOU MINZHONG

Fangcheng kaj aliaj ĉemaraj urboj de Guangxi konstruiĝas dekkelkaj ankrejoj por 10 000-tonelaj ŝipoj. Antaŭvideble, la Nanning-Kunming-a Fervojo multe faciligos eksportadon el sudokcidenta Ĉinio.

La fervojo interligas Yunnan, Guizhou, Sichuan, Guangxi kun Hainan kaj plirapidigos iliajn ekonomiajn kunlaboron kaj disvolviĝon kaj prosperigos la ekonomion de sudokcidenta Ĉinio. ■



Sternado de trako



Konstruado de tunelo Foto de ZHOU MINZHONG

Kurantaj aferoj

● Ministro Hou Jie (Hoŭ Ĝje) de la Ministerio de Konstruado de Ĉinio diris antaŭ nelonge, ke en Ĉinio la sistemo pri bonstatiga distribuo de loĝdomoj estos anstataŭigita paŝon post paŝo per tiu pri varigo de loĝdomoj.

Li diris, ke por la ĉinaj laboristoj kaj ŝtatoficistoj estas malfacile akcepti la fakton, ke ili devas aĉeti loĝdomon per sia propra mono, ĉar dum sufiĉe longa tempo la loĝdomoj estis distribuataj de koncerna instanco kiel bonstatigaj favoraĵoj. Sekve, en la proksima estonteco oni ne povos plene aboli la malnovan sistemon. Tamen, post kiam ĝi estos abolita, la ŝtato iel helpos ŝtatoficistojn kaj la loĝantojn, kiuj havas grandajn malfacilojn por aĉeti loĝdomon.

● En 1996 la totala valoro de importaĵoj kaj

eksportaĵoj de Ĉinio atingis 289.9 miliardojn da usonaj dolaroj kaj okupis la 11-an lokon en la mondo tiukampe. Laŭ takso, ĝi atingos 400 miliardojn da usonaj dolaroj en 2000. De 1997 ĝis 2000 la totala valoro de eksportaĵoj de Ĉinio estos sume 700 miliardoj da usonaj dolaroj.

● La 12-an de majo estis lanĉita la telekomunikacia satelito "Ruĝa Oriento" n-ro 3, elfarita de Ĉinio, en la Xichang-a Centro de Satelita Lanĉo en Sichuan-provinco.

● En 1997 kaj 1998, pro bezono de plej avangardaj sciencoj, la Ĉina Akademio de Sciencoj elkulturos ĉiujare 100 fakulojn por la venonta jarcento.

Fine de la kuranta jarcento la ĉina registaro asignos 2 miliardojn da juanoj (8.4 juanoj egalas al unu usona dolaro) por novgeneraciaj instalaĵoj de plej avangardaj sciencoj, kiaj granda astronomia lorno, duperioda projekto por ĉambro de sinkrona radiado, dank' al kiu la ĉinaj instalaĵoj



Montvilaĝanoj scivolemaj pri trajno

de sinkrona radiado tenos la monde avangardan nivelon komence de la venonta jarcento; reto por observi la movadon de terkrusto k.a.

- La Asocio de Ĉinaj Oceanografoj informis, ke pro malmultiĝo de riĉfontoj sur la kontinentoj oni turnas sian atenton al internaciaj ocean-fundoj riĉaj je mineraloj. Laŭ kalkulo de fakuloj, la plurmetalaj kernoj, kiuj kuŝas funde de la oceanoj profundaj inter 4 000 kaj 6 000 m, havas rezervon de 70 miliardoj da tunoj da metaloj, kiaj kupro, nikelo, kobalto kaj mangano. Nun Ĉinio sukcesis elfari aparaton por observi plurmetalajn kernojn sub marakvo profunda je 6 000 m. Kaj en 1999 ĝi rezervas 75 000-kvadrat-kilometran ocean-fundon kun mineraloj por komerca ekspluatado.

- Ĉinio sukcesis fabrikii la unuan vapor-turbinan generatoron kun kapacito de 600 000 kilovattoj, kies projekto estis plenumita kune de Ĉinio kaj Japanio. Ĝi ebligos al Ĉinio ĉefe uzi tiajn generatorojn en termoelektra produktado en la 21-a

jc.

- En Jiangxi(Ĝjangŝji)-provinco de Ĉinio, anstataŭ kemia sterko, oni sterkas rizkampon per katabolaj bakterioj kaj sukcesis produkti senpolucian rizon.

- Komenciĝis la konstruado de la sistemo de 26 000-kilometra fotokablo funde de la Pacifika Oceano inter Ĉinio kaj Usono. Ĝi estas iniciatita kune de telekomunikaj kompanioj de Ĉinio, Usono, Japanio, Koreio kaj Singapuro kaj plenumiĝos fine de 1999. La kablo kontentigos la cirkvitan bezonon de tiuj landoj en la komenco de la 21-a jc.

- De la 80-aj jaroj la aŭtokvanto de Ĉinio kreskas meznombre je 13% ĉiujare. Sed serioziga tagon post tago gasa polucio en Pekino, Ŝanhajo, Kantono kaj aliaj grandaj urboj. Rezulte de tio, la aero en tiuj urboj malpuriga kaj polucia denseco de ĉefaj stratoj kaj vojkruciĝoj estas super la normo. Tial mildigi kaj forigi la aŭtan polucion fariĝis tasko neprokrastebla.

Hongkong-a Esperanto-Asocio okazigis la unuan E-semajnfinojn

Antaŭ la reveno al la sino de la patrolando, la Hongkong-a E-Asocio organizis la unuan Esperantan semajnfinojn de la 14-a ĝis la 15-a de junio, sur la pitoreska insulo Chang Zhou.

Malgraŭ la pluveta vetero, partoprenis 24 personoj, inter ili multaj estas novaj interesatoj de Esperanto. Ili informiĝis pri Esperanto kaj pere de ĵurnalo, interreto, aŭ de alilandaj amikoj. Estas ĝojinde, ke la plejmulto de ili estas junuloj.

Dum la malfermo, prezidanto s-ino Eruda Li prelegis pri la historio de Esperanto, la internacia E-movado kaj la movado de Hongkong. Ŝi ankaŭ laŭtlegis la salutleteron de la Ĉina Esperanto-Ligo al la Hongkong-a E-Asocio. La afabla saluto kaj sincera bondeziro de la esperantistaro de la patrolando forte kortuŝis ĉiujn aŭskultantojn.

La ĉefa programo de la semajnfino estas E-kursoj por komencantoj kaj por progresin-



toj. Ĝenerala sekretario de la Asocio, germana junulo Werner, gvidis la kurson por progresintoj, kaj kurso por komencantoj estis gvidata de nova tamen talenta membro Bill Mak. Ili ambaŭ tre flue parolas Esperanton kaj estas ankaŭ tre spertaj pri la instruado. Dank' al ilia klopodo, la kursoj estis tre sukcesaj. Ĉiuj komencantoj deziras daŭrigi la lernadon, kaj kelkaj progresintoj jam kuraĝis "ekparoli".

La semajnfino estas tre fruktodona. La nomita Asocio planas organizi pliajn tiajn semajnfinojn por plifortigi la amikecon inter la esperantistoj kaj plialtigi la lingvan nivelon de la membroj. (Li Renzhi)

Ĉinaj samideanoj ĝojas pri la reveno de Hongkong al la patrolando


La 7-an de junio, ĉ. 50 samideanoj el diversaj rondoj de Pekino sin trovis en kunsido okaze de la baldaŭa reveno de Hongkong al la patrolando.

La kunsidon prezidis ĈEL-prezidanto kaj EPĈ-vicĉefredaktoro, s-ino Tan Xiuzhu. Honora membro de UEA, eksa EPĈ-ĉefredaktoro, s-ro Zhang

de E-organizoj de Pekino al la Hongkong-a E-Asocio. En la letero oni adresas gratulon al la nove fondita Hongkong-a Esperanto-Asocio kaj esperas, ke ambaŭflankaj e-istoj fruktdone kunlaboros por progreso kaj prospero de E-movado en Hongkong kaj la ĉeftero. Oni esprimis sian senton por Hongkong per kantoj, poemoj kaj kaligrafiaĵoj. Akademiano Laŭlum kaj E-poeto Lu Jixin verkis la kantojn: "Hongkong nun iras al mi", "Ĉiuj jubileas" kaj "Brilu perlo de la Oriento", kiujn prezentis junuloj de EPĈ kaj kursanoj de Laŭlum. Profesoro Zhou Liuxi verkis poemon kaj s-ro Yuan Ming kaligrafis ĉinan ideogramon, kiu signifas revenon. La kunsidon ĉeestis ankaŭ korea e-isto Choi Man-won, kiu studas en Pekino kaj interesiĝas pri la evento.



La aŭtoro (dekstre)



De “fare de” al “far”

de LI SHIJUN

En tiu ĉi artikolo akademiano Li Shijun proponas simpligon de prepoziciaĵoj kaj ĝeneralan uzon de infinitivo post prepozicioj kaj pritraktas la kutimon kaj evoluon de la internacia lingvo. Ni esperas, ke lia renovigo sekvigos pozitivan diskuton pri tiuj lingvaj demandoj.

La Red.

LA prepozicioj estas inter la plej viglaj elementoj de Esperanto. Tion klare montras al ni du faktoj: 1. Statistiko montras, ke la plejparto de ili (28 el 34) estas inter la 179 plej ofte uzataj vortoj de la lingvo; 2, ĉiuj lernolibroj detale klarigas ilian uzon per ekzemploj. Mia studo kaj praktika uzado de Esperanto dum 57 jaroj montris al mi, ke la evoluo de nia lingvo estas rimarkebla ankaŭ ĉe la uzado de prepozicioj.

En 1931, Kalocsay montris al ni, en sia artikolo “Sendemandaj Respondoj”, la neceson precize diferencigi inter la multaj sencoj de la prepozicio *de* kaj la proponojn pri adapto de *depost*, *ekde*, *deĉe*, *deper*. Li aparte atentigis pri la uzo de *deper* por montri la aganton. En 1963, li esprimis sian preferon de *fare de* al *deper*. Kaj en la okdekaj jaroj, kiam la Akademio de Esperanto voĉdonis pri prepozicioj an-

stataŭ la multsignifa *de* por indiki la aganton, oni aprobis *fare de*. Sed nun oni laŭte parolas pri la preferendo de *far*, kiu fariĝas pli kaj pli ofte uzata ol *fare de*.

La evoluo de la multsignifa *de* al *fare de* kaj poste al *far* klare montras al ni tendencon al precizeco kaj simpleco. *Far* estas pli preciza ol *de* kaj pli simpla ol *fare de*, tial ĝi pli kaj pli populariĝis. Ankaŭ en tiu ĉi okazo ni vidas la gvidan principon: neceso kaj sufiĉo. Estas necese precizigi la signifon de la prepozicio *de*; estas sufiĉe alpreni la nudan radikon *far* anstataŭ *fare de* por montri la aganton. Pensu pri la vojo irita de *per*, *pere de* kaj ni povas konstati, ke *far* venis en la mondon laŭ retroira vojo kaŝita en la vortfarado de Esperanto; ĝi ne estas fremda elemento sed ido kreita laŭ leĝo de nia lingvo. La eltrovo de *far* kiel preciziga anstataŭanto de *de* signifas konsci-

iĝon pri tiu interna leĝo de Esperanto. Tio estas utila por racia disvolviĝo de nia lingvo.

Dank’ al estas unika kaj interesa fenomeno en la gramatiko de Esperanto, nome temas pri elizio de adverba finaĵo “e”. Ĉar tiu elizio estas escepto en la lingvo, oni intencas nuligi ĝin por unuecigo, kaj proponas uzi la formon *danke al*. Ja ekzistas longa serio de tiaj prepoziciaĵoj kiel ekz. *koncerne al*, *konforme al*, *proksime al*, *rilate al*, kaj *spite al*. Tamen eble iuj ŝatus demandi, kial naskiĝis kaj vivadis la unika infano *dank’ al*. La sola akceptebla respondo estus: Por ekonomio. Preferindas formo pli mallonga. Se tia estas la kazo, kial do ni preferu la pli longa formon *danke al*? Kial ni ne imitu la ekzemplon de “*far*” kaj alprenu la radikon “*dank*” kiel prepozicion? Ni ekzamenu jenajn ekzemplojn por vidi, ĉu tia lingvouzo estas akceptebla.

1. Mi vidis la veron **dank** lia helpo.

2. La knaboj rapide progresis en gramatiko **dank** lernado de Esperanto.

3. Multe pli rapidas la trafiko **dank** invento de novaj veturiloj.

4. La esplorado glate iras **dank** apliko de elektronika mikroskopo.

5. La aventurulo povis travivi la malfacilon **dank** fontakvo.

Se ni anstataŭigus “dank” per “pro” aŭ “per”, ni povus klare vidi, ke dank tre simile funkcias kiel tiuj klasikaj prepozicioj. Ni ne povas trovi kialon rifuzi uzon de dank kiel plenrajta prepozicio. Analogie, ni povas uzi *koncern*, *konform*, *kontrast*, *proksim*, *spit* anstataŭ *koncerne al*, *konforme al*, *kontraste al*, *proksime al*, *rilate al*, *spite al* k.s. kiel jenaj ekzemploj montras:

1. Ili longe diskutis **koncern** okazigo de aparta simpozio pri gramatiko.

2. Ili tuj organizis volontulajn trupojn **konform** sia deklaro.

3. Brilis giganta verda stelo **kontrast** la oranĝa fono.

4. Nova fervojo aperis **proksim** ilia hejmloko.

5. Novan paŝon oni faros **rilat** nasklimigo.

6. **Spit** konsiloj de la amikoj, li ne revenis al la urbo.

Nun mi volas rimarkigi vin, ke ekzistas prepoziciaĵoj similaj al *koncerne al*, nome *depende de*, *escepte de*, *inkluzive de*, *proksime de* ktp. Se ni povus uzi *dank* anstataŭ *danke al*, kial ne *escepte de*? Kaj analogie, ni povas ankaŭ uzi *flank*, *inkluziv*, *proksim*, anstataŭ *flanke de*, *inkluzive de*, *proksime de*. Ankaŭ *kompare kun* kaj similaj povas esti anstataŭataj de *kompar* k.s. Ni ekzamenu kelk ekzemplojn por vidi ĉu tio kaŭzas malklarecon:

1. Polica motorciklo galopis **flank** la aŭto de la krimulo.

2. Mi pagis 100 dolarojn **inkluziv** 10 por la tramo-bileto.

3. Ĉiuj geknaboj partoprenis la ekskurson **escept** la malsanaj.

4. La nova formo estas pli oportuna **kompar** la malnova.

La novaj infanoj en la prepozicia familio frapas niajn okulojn

je la unua vido, sed ili ja ne estas fremdaj elementoj, ĉar ili naskiĝas laŭ interna leĝo reganta la vortfaradon de Esperanto.

Mi rimarkis ĉe pluraj verkistoj uzon de infinitivo post la prepozicio pri. Ankaŭ mi imitis ilian ekzemplon. Sed PAG diras: “infinitivo ĝenerale ne toleras prepozicion antaŭ si. Nur tri prepozicioj estas kutime uzataj antaŭ infinitivo: anstataŭ, krom kaj por.” Efektive Zamenhof kaj multaj aliaj uzis *sen* antaŭ infinitivo. Kial do “infinitivo ĝenerale ne toleras prepozicion antaŭ si”? Kaj kial la tri prepozicioj *anstataŭ*, *krom* kaj *por* “estas kutime uzataj antaŭ infinitivo”? Kial ili havas tian rajton? Per kio oni povas pravigi kaj persiste sekvi tiun kutimon? Kial oni ne povas uzi infinitivon post *pro*, se oni povas uzi ĝin post *por*? Kial oni ne povas ĝenerale uzi infinitivon post prepozicioj, se la kombino donas klaran sencon? Bonvolu legi jenajn ekzemplojn:

1. Mi havigis al mi amikojn eksterlandajn **pro** lerni kaj uzi Esperanton.

2. En tiu instituto, li permesis al si kultivi florojn, **inter** studi biokemion kaj eksperimenti pri kemiaĵoj.

3. Ili tro longe sidis **super** debati tiun problemon.

4. La kunvenantoj longe parolis **pri** disvastigi Esperanton en universitatoj.

5. La bubo forportis la transtistoron **malgraŭ** kolerigi la gepatrojn.

6. La popolo batalas **kontraŭ** uzi insekticidojn pro polucio.

7. La ekskursantoj daŭrigis sian promenadon **post** remadi sur la pitoreska lago.

8. **Antaŭ** komenci novan lecionon, la instruisto gvidis siajn kursanojn relerni la lecionon instruitan.

Se la uzo de infinitivo post prepozicio povas ŝpari al ni vortojn sen malklarigo de la senco, kial ni evitu tion? Ĉu oni povus trovi racie akcepteblan pravigon de la malnova lingvouza kutimo? Se ne, ni do povas ĝeneraligi la uzon de infinitivo post prepozicioj, kondiĉe

ke la kombino donu klaran sencon.

Kredeble, nombro da samideanoj trovas miajn rimarkigojn malplaĉaj pro la ŝajnaj impetemo aŭ novismo, kvankam mi mem volas malplaĉi al neniu pro inklino al novismo aŭ reformismo. Mi bone konscias, ke tre gravas stabileco por Esperanto, se ni deziras, ke ĝi gajnu pli kaj pli multajn adeptojn kaj triumfu mondscale. Ni tamen ne devas fermi la okulojn kaj ignori la rimarkindan tendencon en la evoluo de la uzado de la prepozicioj. Mi opinias, ke akcelo de tia evoluo favoras al la kreskado de la lingvo, ĉar dank akcepto de la novaj prepozicioj, la lingvo disponos pli da elekteblaj esprimiloj kaj esprimmanieroj por diri tion kion ni volas. La novnaskitoj ja ne celas forpuŝi kaj nuligi la antaŭaĵojn, ilia apero signifas helpon al la onkloj kaj avoj en la prepozicia familio.

La prepozicioj, same kiel la konjunkcioj kaj subjunkcioj, estas vortoj nevariaj (senfinaĵaj), tial la vortoj *dum* ne ricevas forman ŝanĝiĝon, kiam ĝi estas uzata jen kiel prepozicio jen kiel konjunkcio. Tamen tio ne validas por *antaŭ* kaj *post*, kaj oni devas uzi la formojn *antaŭ ol*, *antaŭ kiam* kaj *post kiam*, por enkonduki subprepozicion kiel jenaj ekzemploj montras:

1. Li donis necesajn klarigojn, **antaŭ ol** li komencis la manipuladojn.

2. Ĉiuj jam klare vidis la avantaĝon de tiu sistemo, **post kiam** inĝeniero faris demonstradon.

Permesu al mi demandi: Ĉu tiuj frazoj malklariĝus, se ni uzus en ili *antaŭ* kaj *post* kiel subjunkciojn anstataŭ la kombinaĵojn *antaŭ ol* kaj *post kiam*? Se tia simpligo ne kaŭzas miskomprenon, kial ni ne povus ilin praktike uzi sendamaĝe? Kaj nia gramatiko povus simple klarigi, ke tiaj nevariaj vortetoj povas funkcii jen kiel prepozicioj, jen kiel konjunkcioj aŭ subjunkcioj.

Parolante pri la prepozicioj, mi volas rimarkigi ankaŭ, ke en Esperanto ekzistas serio da vortoj kun praprefikso pre-: predikato, pre-

ĈINIO

● Literatura gazeto “Penseo” en Esperanto, kiu fondiĝis en la jaro 1990, jam havas 70 numerojn. Ĝi prezentas ĉinan antikvan literaturon kaj originalajn verkaĵojn. Januare de 1997 la Esperanta Domo Donghu de la Hubei-a Esperanto-Asocio transprenis ĝian eldonadon ekde ĝia 62-a numero. Post nelonge ĝi havos hejmpaĝon en interreto, ĝia adreso estas <http://www.geocities.com/Toryo/Flats/2394>. Ĝia retpoŝta adreso: Penseo @ geocities.com

Por regule eldoni “Penseo”, la domo decidis starigi fonduson de eldonado de “Penseo” kaj kovri la koston de preso kaj sendo per abonpago kaj mondonaco de diversaj rondoj. Iu persono zorgos pri la fonduso, kaj ĉiujare en la naskiĝtago de Zamenhof oni publikigos la mondonacon kaj elspezon. (Peng Zhengming)

● Respektive en la 14-a de marto kaj la 8-a de aprilo 1997 la Poŝta kaj Telekomunika Ministerio de la Ĉina Popola Respubliko emisiis la poŝtmarkoseriojn “Elektitaj Pentraĵoj de Pan



Memorigaj poŝtstampoj

Tianshou” kaj “Ĉina Teo”. La Haikou-a Poŝtmarka Kompanio de Hainan-provinco uzis en la emisiaj tagoj memorigajn poŝtstampilojn en la ĉina lingvo kaj Esperanto, kies desegninto estas s-ro Zhang Linrui (Ĝang Linĵuj).

FRANCIO

● Silvestra Balo, kulturaj aranĝoj kaj ekskursoj okazos inter la 30-a de decembro 1997

kaj la 3-a de januaro 1998 en Parizo. Informas Raymonde Perault, Centre Culturel Esperanto de Paris, 4 bis, rue de la Cerisaie 75004 Paris, Francio. Tel: 01 42786886 Fax: 01 42780847. (Raymonde Perault)

GERMANIO

● Medicin-sciencia fakgrupo de la Amikaro Bruno Gröning estas unu el la tutmonde plej grandaj grupoj pri spirita saniĝado, en kiu ĝis nun ankoraŭ ne ekzistas Esperanto-sekcio en la medicina fako. En la fakgrupo estas kunligitaj pli ol 1 600 personoj el kuracaj profesioj, inter kiuj ĉirkaŭ 300 estas medicinaj kuracistoj. Pere de regula, senpage eldonata fakrevuo, kunvenegoj kaj regionaj kunvenoj, spertoj estas interŝanĝataj kaj la ligitaj fakuloj konatiĝas kun la spirita saniĝo. Ĝis nun en Germanio, Aŭstrio, Svislando, Nederlando, Belgio, Hungario, Pollando, Rusio kaj Ukrainio, fakularoj estis klerigitaj tiurilate per prelegoj antaŭ fakpubliko. Interesiĝantaj kuracistoj kaj ankaŭ personoj el aliaj kuracaj profesioj turnu sin kun mencio de la profesio kaj komprenataj lingvoj al la respondeculo de la amikaro pri Esperanto: Detlef Meier, Hauffstri. 15, D-63071 Offenbach, Germanio. (Detlef Meier)

NEDERLANDO

● Post 30-jara laborado de Hugo Röllinger aperis ĉe UEA la libro Monumente pri Esperanto. Kiel komisiito de UEA Röllinger kolektis informojn pri ĉiuspecaj ZEOj, t.e. Zamenhof/Esperanto-objektoj: stratoj, placoj, parkoj, pontoj, konstruaĵoj, skulptaĵoj, ŝipoj, eĉ asteroidoj. Entute li registris 1 044 ZEOjn en 54 landoj de ĉiuj kontinentoj. La nuna dokumentaro estas kompleta registro de ZEOj de la jarcento 1896-1996. Monumente pri Esperanto enhavas, krom laŭlanda listo de ZEOj kun indiko pri iliaj loko kaj jaro de ekesto, ankaŭ artikolojn, en kiuj la aŭtoro rakontas kolorplenajn historiojn de multaj el ili. La 111-paĝan abunde ilustritan libron redaktis Thomas Bormann. (UEA)

fako, preferi, prefikso, preludo, premiso, preparo, prepozicio, prezidi k.a. Evidente pre- signifas antaŭ. Do ni povus uzi “pre” kiel prepozicion paralele kun antaŭ. Tio neniom pezigus la taskon de la lernantoj kaj pro ĝia ofta uzado beligus la lingvon per varieco. Cetero. ĝi povus faciligi skandadon de

versoj kaj favorus al mallongigo kaj belsonigo de frazoj. Mi opinias, ke tia malderivo utilas al la vortfarado kaj ĝia ĝenerala apliko povas helpi nin krei novajn vortojn sen adopti fremdajn radikojn. Kaj oni eĉ povus enkonduki la formon “prevorto” por anstataŭigi la longan “prepozicio”. ■

Bibliografio:

1. Plena Analiza Gramatiko de Esperanto
2. Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto
3. Lingvo Formo Stilo (K. Kalocsay)
4. Baza Radikaro Oficiala (en la Aktoj de la Akademio 1968-1974)

Proverboj pri infanoj

Enkonduko

En ĉiuj kolektaĵoj da proverboj abundas tiuj temantaj pri infanoj. Inter dekoj da saĝaj diroj pri homidoj oni povas informiĝi pri la karaktero de infanoj, ilia rolo en la familio kaj pri tio kiel eduki ilin. Kiel ofte okazas en ĉiuspeca materialo celanta speguladon de la scioj kaj observoj pri homa konduto, kiuj karakterizas specifan kulturon, troviĝas nemalmultaj proverboj kun kontraŭdira enhavo. Tio signifas, ke oni ne devas tro facilanime kredi, ke popoldiroj ĉiam esprimas eternajn veraĵojn, krom se oni akceptas la vidpunkton, ke la vero mem povas havi du kontraŭajn flankojn ambaŭ egale validajn laŭ la cirkonstancoj. Por faciligi komparadon, la proverboj tie ĉi estas aranĝitaj en grupoj surbaze de temoj, kiuj kunligas ilin.

A. Infanoj kaj gepatroj spegulas siajn karakterojn

1. Kiaj la gepatroj, tiaj la infanoj.
2. En infano vidiĝas, kia homo fariĝas.
3. Patro estas konata laŭ la infano.
4. Infanaĝo montras la viron same kiel mateno montras la tagon.
5. Infana inklino restas ĝis la fino.
6. Estas saĝa patro, kiu konas sian propran infanon.
7. Estas saĝa infano, kiu konas la propran patron.
8. La patrino plej bone scias, ĉu la infano similas al la patro.

B. Amo kaj malamo

1. Kiu havas neniun infanon, ne scias, kio estas la amo.
2. Granda viro estas tiu, kiu ne perdas la amon de sia infano.
3. Amata infano havas plurajn nomojn.
4. La infano malamas tiun, kiu donas al ĝi ĉion, kion ĝi deziras.
5. Malamataj infanoj ne timas la mondon.

C. Amo al infano povas havi alian celon

1. Gardu vin kontraŭ la viro, kiu kisas vian infanon; li baldaŭ kisos vian edzinon.
2. Kiu viŝas la nazon de infano, intencas kisi la vangon de la patrino.

3. Kiu kaptas la infanon je la mano, kaptas la patrinon je la koro.
4. Multaj kisas la infanon pro la vartistino.

Ĉ. Infanoj estas benoj por la gepatroj

1. Kiu havas infanojn, havas benojn.
2. Pli da infanoj, pli da beno.
3. Bona infano estas beno de Dio.
4. Infano en domo estas cent ĝuoj.
5. Infanoj estas la ornamo de geedzeco.
6. Hejmo sen infanoj estas kiel domo sen fenestroj.
7. Pli da infanoj, pli da manoj.
8. Infanoj kaj glasoj neniam estas tro.
9. Infanoj estas la riĉeco de malriĉulo.

D. Infanoj kaŭzas zorgojn

1. Se ne estus infanoj, ne estus larmoj.
2. Estas pli bone, se la infano ploras pli ol ĝiaj gepatroj.
3. Ne estas animangoro, ĝis kiam oni havas infanojn.
4. Infanoj estas certaj zorgoj sed necertaj komfortoj.
5. Malgranda infano, malgranda zorgo; granda infano, granda zorgo.
6. Malgrandaj infanoj kaŭzas laboron, grandaj — doloron.
7. La fingrodoloro de infano donas kordoloron al la patrino.

8. Infanoj unue kaŭzas brakdoloron, poste kordoloron.

9. Kiam infanoj estas junaj, ili stultigas la gepatrojn; kiam ili estas pli aĝaj, ili frenezigas ilin.

10. Bonaj infanoj gepatrojn feliĉigas, malbonaj ilin entombigas.

E. Infanoj kaŭzas ekonomiajn problemojn

1. Patroj avaras, infanoj malŝparas.

2. Infano multe helpas: ĝi purigas unu fiŝon kaj manĝas du.

3. Infanoj disigas per forko, kion gepatroj kunskrapis per rastilo.

4. Pli zorgas unu patrino pri dek infanoj, ol dek infanoj pri unu patrino.

F. Petolado kaj puno

1. Malfacile estas infanoj bonaj, se la gepatroj estas malbonaj.

2. Infanon malbonigas ne petolado, sed malbona kamarado.

3. La diablo ne povas esti ĉie, do li kreis infanojn.

4. Estas pli facile enbati du diablojn en infanon ol elbati unu el ĝi.

5. Por bona infano ankaŭ la vorto estas puno.

6. Se la vergon vi domaĝas, ian infanon vi damaĝas.

7. Amu viajn infanojn per via koro, sed eduku ilin per viaj manoj.

8. Per la dekstra mano ili batas la infanon kaj per la maldekstra karesas ĝin.

9. Ne punu edzinon antaŭ infanaj okuloj, ne punu infanojn antaŭ fremduloj.

G. Manĝado kaj malsato

1. Infanoj kaj kokinoj devas ĉiam manĝeti.

2. Tio, kion infano ŝatas, neniam malutilis ĝian stomakon.

3. Infanoj neniam havas sufiĉon, kiam ili provizas manĝon por si mem.

4. Infano, kiu neniam estis en fremda urbo, diras, ke ĝia patrino plej bone kuiras.

5. Infano sen vestoj ridas, tiu sen manĝoj neniam.

6. Se vi deziras, ke viaj infanoj havu trankvilan vivon, lasu ilin esti iom malsataj kaj malvarmaj.

Ĝ. Silentado, parolado, plorado

1. Infano pli rapide lernas paroli ol silenti.

2. Instruu al via infano esti silenta; ĝi ja baldaŭ lernos paroli.

3. Infanoj estu vidataj kaj ne aŭdataj.

4. Infano ne krias, patrino ne scias.

5. Silenta infano planas petolaĵon — aŭ jam

faris ĝin.

6. Infano subite ĝojas, subite ploras.

7. Ĉiu infano venas en la mondon plorante.

8. La mano de infano rapide pleniĝas kaj ĝia kolero rapide foriĝas.

9. Infano, kiu mem falas, ne ploras.

H. Infanoj kaj stultuloj

1. Infanoj kaj stultuloj havas gajan vivon.

2. Infanoj kaj stultuloj ne ludu per akranandaj iloj.

3. La mano de infano kaj la buŝo de stultulo ĉiam estas malfermitaj.

4. Infanoj, ebruloj kaj stultuloj diras la veron.

Ĥ. Edukado de infanoj

1. Se junulo ne lernis, maljunulo ne scias.

2. La plej bona ĉevalo bezonas dresadon, kaj la plej lerta infano bezonas edukadon.

3. La unua leciono por via infano estu obeado; la dua povas esti io ajn laŭ via volo.

4. Viro inter infanoj longe restos infano; infano inter viroj baldaŭ iĝas viro.

5. Kiu instruas infanon, instruas tri: knabon, junulon kaj maljunulon.

I. Pli da diverstemaj proverboj

1. Ne estu forĵetita la infano kun la bano.

2. Infano estas infano, kvankam ĝi estas la filo de sultano.

3. Por patrino ne ekzistas infano malbela.

4. La infano de la tajloro estas la plej malbone vestita.

5. Kiu postlasas infanon, vivas ĝiseterne.

6. La "kial" de infano estas la ŝlosilo de la filozofio.

7. Bruliĝita infano timas la fajron.

8. Kiu cedas al sia infano, ĝin pereigas per propra mano.

9. Ve al la regno, kies reĝo estas infano.

10. Infano ŝtelas ovon, grandaĝulo ŝtelas bovon.

11. Ne laciĝu viaj manoj pri fremdaj infanoj.

12. Infanoj de maljunaj gepatroj frue fariĝas orfoj.

13. Al malriĉulo infanoj ne mankas.

14. Dio donis infanon, Dio donos por ĝi panon.

15. Ju pli la infanoj bezonas, des pli Dio al vi donas.

16. Honoru infanon kaj ĝi honoros vin.

17. Ankaŭ stultuloj povas fari infanojn.

18. Via propra infano estas delikata; alies infano estas kruda kiel led.

19. La armilo de infano estas ĝia plorado.

20. Infano edukita de vidvino estas kiel bovo sen gvid-ŝnuro. ■



“Morgaŭ mi fariĝos

Antaŭ unu monato mia amikino Yao telefonis al mi: “Morgaŭ mi ricevos ateston pri geedziĝo kaj fariĝos novedzino.” La novaĵo ĝojigis min. Laŭ la popoldiro “Devas geedziĝi plenkreskintaj gejunuloj”, por la 28-jara Yao do estas tempo edziniĝi. Tiukaze, mi volas iom prezenti en tiu ĉi rubriko la geedziĝon de la nunaj ĉinaj gejunuloj.

Suno

YAO KAJ ŜIA DEZIRATA EDZO

Antaŭ du jaroj, mi konatiĝis kun Yao. Ŝi estis bela fraŭlino, naskiĝis en kompare riĉa intelektula familio de Pekino. Ŝi estis dorlotata plej juna infano en la familio. Ŝi havas du pliaĝajn fratinojn. Glate ŝi travivis la lernjarojn kaj eklaboris en iu ĵurnala redakcio post diplomiĝo el universitato. Tamen ŝi havis ĉagrenon en amafero. Ŝi havis kelkajn amatojn, sed neniu el ili fariĝis ŝia edzo. Do kia estas la ideala fianĉo, laŭ ŝia opinio? Ŝi tiel respondis, ke li devas esti diligenta, bone edukita, pardonema kaj komprenema; kaj krome financa bazo kaj respondeco por familio estas nemankigeblaj.

He, samprovincano de mia edzo, vivis en soleco post disiĝo de la amatino. Post diplomiĝo en 1988 el la komputera fakultato de la Pekina Universitato, unue li laboris en granda komputera kompanio tri jarojn, poste li mem fondis kompanion por projekti softvarojn, kiu nun iom famas kun pli ol 30 laborantoj. La kompanio okupis lin, ke li apenaŭ havis tempo por akompani kaj prizorgi la

amatinon. Tio kaŭzis rompon de ilia amrilato kaj tre bedaŭrigis lin.

Mi kaj mia edzo opiniis, ke He kaj Yao povas esti konvena paro. Tial ni serĉis ŝancon ilin interkonigi. Du jarojn poste, ili deklaris sian geedziĝon.

KIAN EDZON ELEKTI?

La vidpunkto de Yao pri geedziĝo iagrade spegulas tiun de la ordinaraj ĉinaj gejunuloj. Junie de 1996 la socia enketa centro de la Ĉina Junulara Ĵurnalo faris enketon titolitan “Amo kaj geedziĝo”. Ĝian demandaron respondis pli ol 20 mil 16-45-jaruloj el ĉiuj lokoj de Ĉinio. La enketo montras, ke por virinoj la ideala edzo devas esti respondeca por familio, diligenta, tenera, bone edukita kaj grandanima; por viroj la ŝatata edzino devas esti milda, respondeca por familio, bone edukita kaj entuziasma. Evidente, “respondeco por familio, tenereco kaj bonedukiteco” estas bonvenaj ĉu al viroj ĉu al virinoj.

Ĉiuj demanditoj dum la enketado metis moralon, sanon, tenerecon kaj karakteron en la unuan lokon. La diferenco kuŝas en tio, ke viroj pli multe atentis la be-

lecon kaj aĝon de virinoj, dum virinoj la klerecon kaj profesion de viroj.

Rilate amon, 39.5% da gejunuloj opiniis, ke amon ne ĉiam sekvas geedziĝo. Ŝajnas al ili, ke amo estas pli grava ol geedziĝo. Tamen tiaj homoj konsistigas malplimulton. 84.3% da enketitoj definitive oponis la diron, ke geedzeco estas tombo de amo. 98.4% da gejunuloj aprobis la opinion, ke feliĉa geedzeco nedisigeblas de respondeco de geedzoj, kaj 92.5% opiniis, ke se la geedzeco jam estas malfacile tenata, pli bone estas disiĝi. Tio signifas, ke la nuntempaj gejunuloj akcentas respondecon por familio; kaj plejparto da gejunuloj emfazis, ke geedzeco devas baziĝi sur amo. En Ĉinio la tradiciaj konceptoj, kiaj “Kunvivu ĉiam kun tiu, al kiu vi edz(in)iĝis” kaj “Divorco ne konvenas al la moralo”, nun frontas al serioza defio.

KIOM DA MONO BEZONATA POR GEEDZIĜO?

Mi partoprenis la geedziĝan festenon de Yao duonmonaton post kiam ŝi ricevis la ateston pri geedziĝo. En la sama tago ŝi kaj

novedzino”



Nupto

ŝia edzo flugis al suda Ĉinio por pasigi mielan tempon. Ili havis agrablan semajnon ĉe la ora marbordo de Hainan-provinco. Poste ili iris al Sichuan-provinco por viziti la gepatrojn de la novedzo kaj festene regalis lokajn parencojn kaj amikojn. Reveninte Pekinon, ili okazigis la geedziĝan ceremonion en hotelo. Kiel svatinto, mi estis invitita kiel plej honora gasto.

Yao kaj He elspezis dekmil juanojn (ĉ. 8.3 juanoj egalas al unu usona dolaro) por la vojaĝo, minimume 5 mil juanojn por la du festenoj kaj 4 mil juanojn por luksaj geedziĝaj fotoj. Tiel ili elspezis entute ĉ. dudek mil juan-

ojn, kiom la jara enspezo de Yao. Tamen Yao opiniis, ke geedziĝo estas grava en la vivo kaj la elspezo indas, kvankam ĝi estas iom granda.

En la grand- kaj mezgrandaj urboj de Ĉinio ne mankas ekzemploj de tia konsumo por geedziĝo. Tamen troviĝas aliaj gejunuloj, precipe ne multe salajrataj, kiuj modeste geedziĝas. Sed la nuntempa geedziĝo sendube estas pli elspeziga ol tiu de maljuna generacio. Mia patrino ofte rakontis al mi pri sia edziniĝo okazinta en la 60-aj jaroj. Tiam anstataŭ aranĝi nuptan festenon miaj gepatroj nur aĉetis kelkajn kilogramojn da bombonoj por regali

la parencojn kaj amikojn. Kia diferenco! Nun multiĝas geedziĝaj manieroj: krom trdicia ceremonio, estas ankaŭ kolektiva nupto, miela vojaĝo per trajno aŭ aviadilo ktp.

Geedziĝa ceremonio nur estas komenco konstrui la novan familion: dekorado de ĉambroj, aĉeto de mebloj, elektraj aparatoj... ĉio ĉi bezonas monon. De kie venas tiom da mono? La enketo montras, ke 78.9% da gejunuloj mem pagas por sia geedziĝo, kaj malmultaj petas monhelpon de la gepatroj. Plejparto da gejunuloj ŝparas monon por sia geedziĝo jam en la tago, kiam ili eklaboras. ■



Fresko en la Templo de Lamaisma Groto

Hohhot, fama lamaisma templo en Ĉinio, estis konstruita en 1573 kiel la unua tia templo en la urbo. En ĝi okulfrapas arĝentaj budhostatuoj, skulptitaj drakoj kaj freskoj.

La templo Xilituzhao estas konstruita en kombino de la hana kaj tibeta kulturoj, bona dispozicio kaj simetrio.

Krom la supre menciitaj, en la urbo troviĝas ankaŭ la Kvinpagoda Templo, la Templo de Lamaisma Groto kaj aliaj. Ĉiujare ilin vizitas sennombraj pilgrimantoj kaj turistoj ĉinaj kaj alilandaj.

La templa urbo Hohhot


Teksto kaj fotoj de HAN HONG

Hohhot, ĉefurbo de la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio abundas je temploj. En ĝi troviĝas eĉ centoj da temploj. Pro tio oni nomas ĝin templa urbo.

Multaj temploj de la urbo estis konstruitaj en la jaroj 1386-1911, kiam regis en Ĉinio Ming- kaj Qing-dinastioj. Tiutempe la temploj okupis pli ol duonon de la teritorio de la urbo kaj en ili vivis ĉ. 10 000 lamaoj. Ĉiu dua aŭ tria mongola viro estis lamao.

Dazhao-templo en

Ŝtonaj budhostatuoj ĉe la Templo de Lamaisma Groto



Religia aktivado



Arĝenta budhostatuo kaj skulptitaj drakoj en Dazhao-templo

Orumita budhostatuo en Dazhao-templo



Eksterordinara hundeto

de LEFEUVRE MAUQUE (Francio)



TELEPATIO aŭ ne telepatio? Mi ne scias, sed konfesu, ke la konduto de Baran estas strangega...Baran estis la pudelo de nia fama verkisto Viktoro Hugo. Tiu hundeto abomenas solecon. Ĝi tre kompatinde ĝenis dum ĉiu foresto de sia mastro. Kun la paso de tempo, tio ofenditis la verkiston kaj, iun tagon, trotedita, li donis Baran al sia amiko: la markizo de Faletans. Tiu ĉi, kiu estis diplomato, foriris al Moskvo. Dum pluraj monatoj, la markizo regule sendis novaĵojn al Viktoro Hugo...Sed iam Baran malaperis — Ĉie oni serĉis ĝin: sur la stratoj de la urbo, kaj en la ĉirkaŭa kamparo — Nenie estis Baran! Post kelkaj monatoj, iun vesperon, en Parizo, la kuiristino de la verkisto aŭdis ĝemojn kaj gratbruojn ĉe la pordo. Dio! estis la kompatinda Baran: malgrasega kaj kotmakulita. Ĝi ĵus iris, sen ies helpo, “piede!” la tre, tre longan vojon de Moskvo ĝis Parizo. Tre kortuŝita, la verkisto, ne plu disiĝis de sia hundeto.

Fidela al domo

de LARISA KUZMENKO (Ruslando)

MIA amikino el la urbo Murmansk adoras sian siaman katon Semjon, tial, kiam ŝia familio decidis veturi suden por ferii, ili prenis ankaŭ ĝin. Ankaŭ ĝi devas ĝui varman sunon. La familio ferii bonege.

Post la ripozo ili decidis veturi Moskvon por ripari sian aŭtomobilon. Post la riparo ili volis forlasi la urbon, sed la kato ien malaperis — trovi ĝin ili nenie povis. Do, elveturante el Moskvo vespere, ili ne kuraĝis plu reveni la korton, kie ili riparigis la aŭtomobilon. Krom tio ili malbone sciis la stratojn de Moskvo. Aperis

larmoj en la okuloj kaj ofendoj unu kontraŭ alia: ja en la aŭtomobilo estis kvar homoj, tamen neniu povis laŭdece zorgi pri la besto. Sed kion fari? La ofendoj estis pardonitaj kaj por forgesi la pardonon ili aĉetis novan katon.

Kion pensis la kato pri siaj mastroj, ni ne scias. La kato konis nek Moskvon, nek la vojon al la urbo Murmansk, sed ĝin gvidis granda instinkto, gvidis ĝin pli ol ses jarojn. La kato ne povis fari mapon, sed eĉ ĉe la plej kurta vojo li pasis du mil kilometrojn, tio estas proksimume po unu kilometro dum unu tago. Kion ĝi manĝis kaj kiel evitis ĉiujn danĝerajn lokojn, neniu

komprenis, sed iun tagon la malpura, maldika, malbone aspektanta estulo ekmiaŭis kaj ekgratis la pardonon de la familio Siniŝin. Post kiam ili enlasis ĝin, la kompatinda estulo tuj glitiris al la kuirejo, al la konata telero kaj satmanĝinte, kiel antaŭ multaj jaroj, ĝi saltis sur la plej ŝatatan ripozlokon — televidilon.

Pri la vojaĝoj de perditaj katoj homoj scias multajn historiojn. Sed ĉu vi renkontis la similan katon, kiu vojaĝis tiom longan tempon kaj tiom longan distancon? Ĉu tion povas fari iu “mal-saĝa” animalo? Ne, ne scias homoj ĉiujn enigmojn de la naturo.

“Animo de lako” kaj “spirito de pentraĵo”

de PANG NAIYING

LA lak-pentraĵoj de Qiao Shiguang (Ĉjaŭ Ŝigŭang) estas tre diferencaj de aliaj pentraĵoj pri akvolando sude de Yangzi-rivero en Ĉinio. Qiao per natura lako kaj ovoŝelo pentras domon ĉe rivereto kaj arkan ŝtonan ponton. La verda koloro penetris en fendetojn de la ovoŝelo kaj donas freŝan impreson, la rivereto pentrita per natura lako havas brilon kaj kvaliton kiel ĉe silkaĵo...

“Jen magia ĉarmo de la natura lako,” diris s-ro Qiao. Jam antaŭ 7 000 jaroj ĉinoj sciis ornamati objektojn per tiu likvaĵo el arboŝelo. Tamen lak-pentraĵo, kiu kreskis el lak-metiartaĵo, havas historion de nur ĉ. 30 jaroj. Qiao sin okupis pri lak-pentrado ankaŭ 30 jarojn.

En ĉiuj procedoj de lak-pentrado oni uzas lakon: kolorigi tabulon, fari farbon, komponi pentraĵon... La natura lako havas siajn “originecon” kaj “karakteron”, kiujn ne havas aliaj materialoj. Qiao plene utiligas tiujn ecojn, por ke liaj pentraĵoj estu plenaj de “animo de lako”. Li donis ekzemplon: se oni metis tro dikajn tavolojn da diafana lako, ĝi iĝis nigra kaj netraversebla, do necesas poluri, poste la koloroj sub la lako iom post iom montriĝis, tiel la pentraĵo ekhavas belan nebulecon. Qiao montris al mi pentraĵon pri floroj: “Rigardu la foliojn. Mi poluris en diversaj gradoj la lakon, sekve la folioj ricevis variajn brilojn. En tiu senco la polurado estas pentrado.”

Ĉinaj pentristoj ŝatas utiligi la blankecon de Xuan-papero (altkvalita papero farita en Xuancheng, Anhui-provinco, speciale por tradicia ĉina pentrado kaj kaligrafado), ekz. ili pentris nur fiŝojn sed ne akvon, do oni povas facile imagi, ke la blanko estas ŝajnigita akvo, tiel la ĉeftemo —



S-ro Qiao Shiguang

la fiŝoj — estas pli okulfrapaj. Qiao ankaŭ lerte uzis tion en lak-pentrado. Ekz. en “Pilgrimantoj” sur la bazo de lako li pentris kelkajn tibet-naciajn pilgrimantojn. Laŭ la malplena bazo oni povas imagi al si: nokta ĉielo, la mistera religio ktp.

La ĉinaj lak-pentristoj bone utiligis la asimileblecon kaj gluecon de lako, prenis oron, arĝenton, cinabron kaj konkon kiel materialojn, tiel iliaj verkoj havas pli abundajn kolorojn kaj esprimivon. En “Strateto de Parizo” Qiao uzis konkon por prezenti stratlampojn, kies brilo do estas tre milda. Li eĉ prezentis la haŭton de la hom-figuroj per lako kaj aluminio, kaj la verko tre similas al ole-pentraĵo. La natura lako ofte ricevas faldojn, kiuj pere de liaj manoj iĝis foliovejoj aŭ malglataj arbo-


trunkoj...

Laŭ Qiao Shiguang, “animo de lako” estas bazo, sur kiu lak-pentraĵo ekzistas kiel speco de pentraĵo kaj diferencas de la aliaj; krome, lak-pentraĵo devas havi ankaŭ “spiriton de pentraĵo”, ĉar ĝi estas pentrartaĵo, sed ne metiartaĵo. Por kapti la “spiriton de pentraĵo”, li ofte vizitis regionojn de nacimalplimulto. Do troviĝas en liaj pentraĵoj lazura ĉielo, blankaj nuboj, verda herbejo, nigraj poefagoj kaj knabinoj en ruĝaj vestoj de la Qinghai-Tibeta Altebenaĵo. En montvilaĝo de Yunnan-provinco li vidis aini-ajn knabinojn, kiuj sin ornamis per ruĝaj faboj, haroj de simio, ostoj de bovo, eĉ skaraboj, kio multe inspiris lin. Li komprenis: Oni povas uzi ĉion kiel belaĵon.

La pejzaĝoj de Qiao, kiel liriko, donas kvieton kaj trankvilon. En liaj pentraĵoj la knabinoj de diversaj nacioj aŭ tordas fadenojn, aŭ vektortas ŝarĝon, aŭ pistas teon, ĉiuj havas belecon sig-



“Urbo sude de Yangzi-rivero”




“Strato de Parizo”

nifoplenan. Li klarigis, ke la trankvila aspekto enhavas multon por pensi, kaj se mi pentrus knabinojn ridegajn, tio donus neniun postguston; la natura lako entenas brilon, do ĝi tre taŭgas por prezenti la trankvilon kaj kvieton.

Qiao rigardas la naturan lakon kiel sian amikon. Estas mirinde, ke liaj mildeco, simpleco kaj kvieteco harmonias kun la “karakteroj” de lako kaj atingis la “kombinon de la naturo kaj la homo”, kiun tre aprecas la ĉinaj artistoj. Li diris, ke oni kreas artaĵon per ligno, terakoto, kotono, lino, silko, lako kaj aliaj naturaj materialoj, evitante la polucion de kemiaĵoj kaj metante homajn sentojn en la verkojn, kio multe diferencas de la indiferentaj industriaĵoj kaj sekvas la modon reveni al la naturo.

Kiel profesoro de la Centra Metiarta Instituto de Ĉinio, li tre ŝatas lakpentration dum pli ol 30 jaroj kaj havas “laborejon” en antaŭurbo de Pekino. En libera tempo li biciklas tien por pentri per lako. Ofte li sidas kun siaj lako kaj pentraĵoj, silente kaj senemocie. ■



“Tibeta knabino”

“Papaveto”



En vespera krepusko

“Strato de alilandanoj”

Teksto de PANG NAIYING

Fotoj de LIU SIGONG

LA urbeto Yangshuo de Guangxi (Gŭang ŝji) en sudokcidenta Ĉinio estas ideala ripozejo por la turistoj, kiuj estas ŝipe vojaĝintaj sur Lijiang-rivero tage kaj vidas antikvajn stratojn en lamplumo vespere. La turistoj tre ŝatas la urbeton, precipe alilandaj, do aperis tie “strato de alilandanoj”.

RAKONTOJ DE LA BUTIKOJ

La “strato de alilandanoj” estas la Okcidenta Strato, kiu havas saman aĝon kiel la urbeto Yangshuo — 1 400 jarojn. Sur la ŝtonplata vojo, antikve kolektiĝis komercistoj, hodiaŭ svarmas turistoj. Sude de la strato viciĝas malnovaj butikoj de silkaĵoj, vaks-tinkturitaj vestoj, teksaĵoj, antikvaj objektoj, kaligrafiaĵoj kaj pentraĵoj, bambuaj metiartaĵoj kaj arboradikaj skulptaĵoj... Norde de la strato staras modernaj drinkejoj, restoracioj kaj kafejoj kun ŝildoj, sur kiuj vidiĝas koloraj reklamoj en la ĉina kaj alilandaj lingvoj. Jen antikva strato kun alilanda gusto. En ĉiuj butikoj aŭdeblas multaj rakontoj.


En la Pentrejo Hutong junaj geedzoj penetras per farboj sur kotonaj T-ĉemizoj, kiujn alilandaj turistoj mendis. La turistoj tre ŝatas vidindaĵojn de Yangshuo, kiel la Monto Luno, Lijiang-rivero kaj antikvaj domoj. Ili petis la junan paron fari pentraĵon pri tio kaj eĉ portreton de loka maljunulo sur iliaj ĉemizoj. La edzino estas pekinano. La nomo “Hutong” signifas strateton por pekinanoj. Ŝi rakontis, ke antaŭ 4 jaroj pro amo ŝi forlasis sian postenon kaj venis al la urbeto sen scio de la gepatroj. Nun ŝi lertas en pentrado. Antaŭ nelonge ŝi loĝis kelktage en Pekino kaj trovis, ke ŝi ne kutimas al la brua urbego.

En la Restoracio Artistoj-amikoj pendas multaj pentraĵoj faritaj de s-ro Zhou, posedanto de la restoracio.

Li diris, ke per la restoracio li kontaktiĝis kun multaj artistoj, kiuj venis por senpage preni manĝaĵon aŭ pentraĵon. Ne gravas mono, sed arto. Li ofte gvidis alilandajn pentristojn skizi en kamparo. Reveninte sian landon, multaj el ili sendis al li albumojn de siaj pentraĵoj. Li lertas ankaŭ en

ludo de la nacia muzika instrumento *erhu*-o. Pasintjare, la 7-an fojon venis al Yangshuo franca junulo, kune kun usona rokmuzikisto. Ili ŝatis pasigi ĝuste la tradician ĉinan Printempan Feston en la restoracio, kie Zhou ludis “Ĉarma Nokto”, tradician ĉinan muzikon. Ilin ambaŭ fascinis la muziko, kvazaŭ klara fontakvo.

Tiel strange, iu manĝejo nomiĝas “Nenio”. Ĝia posedanto Huiping, ĝŭang-a junulino, diris, ke iu nederlanda amiko donis la nomon, ĉar kiam li unufoje vizitis Yangshuo, neniu lokano konis fremdan lingvon kaj ĉiuj respondis “nenio” al lia demando pri vojo. Li desegnis humuran bildon por la manĝejo kaj faris klarigon: nenio malbon-gusta por manĝado; nenio malbona en servo; nenio pli postulata je pagigo. Mankas nenio signifas havi ĉion: havi kafon, bieron, ĉinajn kaj eŭropajn




Klientoj kun la mastrino

manĝaĵojn, certe ankaŭ ĉiĉeronojn kaj interpretistojn. Huiping ne nur lertas en kuirado, sed ankaŭ ĝuigas al la turistoj “ĉinan kuirarton”. Ŝi povas ankaŭ libere konversacii kun alilandanoj en fremda lingvo. La stranga nomo kaj bona servo de la manĝejo allogas multe da klientoj. Huiping turis-

mis en Eŭropo kaj lernis iom el la germana lingvo. Ŝi deziras lerni ankaŭ la hispanan. "Sen lerni mi ricevus nenion nek povus vivi."

La Drinkejo Frato estas entreprenata de ĝemelaj fratoj Gao kaj junulo Jack el Nov-Zelando. Nin akceptis Julia, fraŭlino el Aŭstralio. Ŝi diris ĉine al ni: "La du fratoj tre lertas en uŝu-o (ĉina luktar-to). Ili nun havas multajn aferojn en Lernejo de Uŝu-o." Tiam venis ilia patro, fama uŝu-isto kaj



Ĉe pentrejo

ĉigong-isto en la urbeto. Li kun la filoj estis foje invititaj al Aŭstralio por prelego kaj donis kura-cadon al multaj homoj. Li diris, ke nun multaj alilandanoj ŝatas uŝu-on. Li kaj la filoj havas multajn alilandajn lernantojn, kiuj tage sin ekzercas en la lernejo kaj vespere libertempas en la Drinkejo Frato.

La drinkejo ne estas granda, tamen tre origi-nala. Muroj el rulŝtonoj, tabloj kaj seĝoj el ligno, tablolampo sur radiko de arbo. La murpenraĵo temas pri sunsubiro. Sur la blua plafono pentriĝis steloj kaj la luno. Li klarigis, ke alilandanoj ŝatas drinki kaj ĝui muzikon en kvieto kaj milda lumo, do la filoj projektis tian drinkejon kaj portis de la riverbordo la ŝtonojn, kaj la penraĵojn faris Julia, kiu tre ŝatas Ĉinion kaj enamiĝis al lia plijuna filo.

En somera nokto la urbeto estas kvieta. Kan-deloj brilas sur la tabloj antaŭ la butikoj. Vidiĝas ankaŭ lumo de la fiŝistaj ŝipoj sur Lijiang-rivero. Aŭdeblas kanto bela. Alilandaj klientoj trinkas bieron, babilante ĝis mateniĝo.

RECIPROKA LERNADO

Pli kaj pli multiĝas alilandaj turistoj, la urbe-

to sentas mankon de interpretistoj, ankaŭ la turis-toj deziras lerni la ĉinan lingvon kaj ĉinajn pentr-arton, ŝakon, kuiradon, brodadon, ĉigong-on ktp. Tiel fondiĝis la Internacia Lingva Instituto Buck-land.

Buckland signifas "brilan estonton" en la gre-ka lingvo kaj "lokon, kie oni instruas gajni dolarojn" en la angla lingvo. Tamen tie ne validas la dua signifo, ĉar la instituto donas senpagan loĝadon kaj manĝadon al la alilandanoj, kiuj lernas tie kaj ankaŭ instruas sian lingvon al aliaj. Kvin jaroj pasis, centoj da ali-landanoj instruis en la instituto.

Aŭstralia panisto Benjamin havas talenton de aktoro. Kiam li instruas al la lernantoj la vorton "simio", li simias; kiam temas pri "piedoj supren", li do stariĝas surmane. Ĉiam aŭdiĝas ridego en lia le-ciono.

Usonano Ray ŝatas doni lecionon en drinkejo. Dum drinkado kaj babilado la in-struisto kaj la lernantoj lernas lingvojn unu de alia. Li trovis, ke iuj lernantoj demandis turistojn pri ilia nomo je la unua renkontiĝo kun ili, li do rimarkigis, ke tio ne estas ĝentila, kaj proponis al la lernantoj taŭgan temon de interparolado.

Ray estas profesoro. Li volas lerni de Lei Feng, kiu tutkore servis al la popolanoj kaj ĉiam pretis helpi aliajn. En la 60-aj jaroj Lei famiĝis tra la tuta Ĉinio. Ĉar "Ray" havas preskaŭ saman prononcon kun "Lei", Ray do petis amikojn nomi lin "Lao Lei". Li nun sin okupas pri fondo de de-penda lernejo en Usono. Al iu ĵurnalisto, kiu deziris lerni tie, Lao Lei diris intence en la ĉina tono: "Morgaŭ ni diskutos."

VIVI EN YANGSHUO


Belga emerito venis al Yangshuo kaj ekloĝis en simpla gastejo. Li verkas novelojn en la pitoreska urbeto. Usonaj geedzoj luis domojn de kampar-ano, ili ĉiutage iras kun bambua korbo al la ba-zaro por aĉeti manĝaĵon, ĝuante la idilian vivon. Franca folkloristo ne nur loĝas ĉe kamparanoj, sed ankaŭ kune kun ili paŝtas bovojn, plugas kam-pon, transplantas rizidojn, eĉ vizitas lernejon kun la infanoj... Tiaj alilandanoj, kiuj loĝis kelkajn jarojn en Yangshuo, estas pli ol 60 mil, trioblo de la lokanoj. Kelkaj alilandaj junuloj eĉ geedziĝis al lokanoj. Ili ĝuas alian vivon kaj kulturon.

Joanne el Aŭstralio edziniĝis al kamparano Li Minqiang, laŭ la ĉina tradicio. Ŝi genuiĝis an-taŭ la bogepatroj, al la festeno venis ankaŭ ŝiaj amikoj alilandaj, kiuj sekvis la ĉinan kutimon donaci "ruĝan saketon" (ene kun mono) al la novgeed-zoj. Joanne bone sekvas la tradician principon de



Alilandanoj sur la strato

Ludo de ĉina ŝako






Diligentaj ekzercantoj



Alilandanoj en la manĝejo "Nenio"



En butiko de turismaj memorajoj

edzino en Ĉinio, multe helpas la edzon. Ŝi diris: "Yangshuo-anoj havas multajn tradiciajn virtojn, mia edzo Li estas tre honesta kaj talenta, mi tre kontentas." Ŝi bedaŭras nur, ke la edzo neniam studis en universitato. Do ili studos ekonomikon en universitato de Aŭstralio.

Okazis pli ol cent internaciaj geedziĝoj en la urbeto. En la Lernejo de Uŝu-o de Gao mi renkontis francajn ĝemelojn. La pli aĝa diris al mi, ke li venis al Yangshuo antaŭ ok jaroj kaj havas ĉinan edzinon, ankaŭ la pli juna volas resti tie. La gepatroj venos viziti ilin en oktobro pro sopiro al la filoj. "Ĉu vi sopiras la hejmon?" mi demandis lin. "Certe. Tamen ankaŭ en Yangshuo estas mia hejmo," li respondis sincere.



En Lhasa ne mankas freŝaj legomoj

KIUJ vivis en Lhasa, ĉefurbo de la Tibeta Aŭtonoma Regiono, tiuj certe sentis la malfacilon manĝi freŝajn legomojn. Lhasa situas en la loko je 3 000 metroj super la marnivelo. Tie la temperaturo estas malalta, trafiko malfacila. Dum longa tempo en la pasinteco la legomoj en Lhasa estis ne nur malmultaj sed ankaŭ malmultspecaj. Tie estis nur terpomoj, rafanoj, brasikoj kaj iuj aliaj. En frosta vintro troveblis neniu verda legomo kaj tiam oni havis nur sekigitajn legomojn, peklitajn legomojn, askalonon kaj ajlon.

Eĉ en la 80-aj jaroj se oni veturis aliajn lokojn de Ĉinio, ili certe kunportis multe da legomoj sur revena vojo, tiam legomoj estis rigardataj kiel bonaj donacoj.

Meze de la 80-aj jaroj, oni transportis multe da legomoj de Sichuan, najbara provinco, al Lhasa per aviadiloj. Kvankam legomoj estis freŝaj kaj multspecaj, tamen multekostaj. Por la loĝantoj de Lhasa legomoj ankoraŭ restis problemo.

Kiam Lhasanoj havos pli da freŝaj kaj malmultekostaj legomoj? Por realigi la deziron, la urbo faris ĉion eblan por transporti pli da legomoj kaj flankmanĝaĵoj de aliaj lokoj de la lando, kaj krom tio ĝi donis grandan atenton al sialoka legomoproduktado. Ekde 1993 Lhasa faris grandan penadon kaj asignis multe da mono por konstrui legoman bazon kun areo de 200 hektaroj, poste tie konstruiĝis forcejoj kaj bedoj tegitaj per plasta membrano, legomĝardenistoj estis teknike trejnitaj, tio bonigis la staton de legomoprovizado de Lhasa.


A Qu estas sperta legomĝardenistino, kiu laboris en teknika eksperimenta farmejo multajn jarojn. Ŝi gvidis plurajn kursojn por konigi al aliaj kamparanoj siajn spertojn pri legomokulturado. En kelkaj jaroj ŝi jam trejnigis pli ol 100 kursanojn, multaj el ili fariĝis tre kapablaj.

Vintre, kiam temperaturo de Lhasa estas $-4 - -5^{\circ}\text{C}$, en bedo tegita per plasta membrano estas tute alia fenomeno: verdas celerio, laktuko, rafano, junaj ajlope-

dunkloj... Oni diris al mi, ke en Lhasa oni nun kulturas tomaton, kukumon, lenton kaj aliajn 30 specojn de legomoj. Oni povas diri tute sen troigo ke tie kreskas ĉiaj legomoj kiaj kreskas en aliaj lokoj de nia lando.

Ekster iu legomejo tegita per plasta membrano, Lage-vilaĝo, mi vidis ke iuj tibetanoj elterigis terpomojn. Ili diris al mi, ke nun tibetanoj alte taksas nutraĵojn. Unu plado ne sufiĉas. Oni bezonas pli multe da legomoj. La ŝanĝiĝo estas utila al legomĝardenistoj, nun tie ĉiuj legomokultivistoj enspezas meznombre 2 000 juanojn ĉiujare.

Pro abundo de legomoj, iliaj prezoj malaltiĝas. Iuj legomoj estas multe malpli kostaj eĉ ol tiuj en aliaj lokoj de la lando. Nun la aliprovincaj legomoj estas pli kaj pli malmultaj en Lhasa. En 1993 ili konsistigis 12% sed nun 5%. Multaj legomoj vendiĝas pli frue je 1-2 monatoj ol antaŭe. Tio multe mallongigis malaktivantan tempon de legomoj. Nun Lhasa ne plu ĉagreniĝas pro manko de legomoj. ■



Vento en Dabancheng

Teksto de SUN AIJUN

Fotoj de LIU SIGONG

“**V**I, Dabancheng-a knabino kun longaj harplektaĵoj kaj ĉarmaj okuloj, edziniĝu certe al mi, sed ne al iu alia...” La popolkanto “Dabancheng-a knabino” iam furoris en la tuta Ĉinio kaj famigis la urbeton Dabancheng. Zumante ĝian gajan melodion, ni veturis al la urbeto je 70 km sudoriente de Urumqi, grava haltejo de komercistoj vojaĝantaj laŭ la Silka Vojo en Tang-dinastio (618-907), por viziti ĝiajn historiajn restaĵojn kaj knabinojn, kiujn kantas la kanton.

ANTIKVA URBO KAJ KNABINOJ KUN LONGAJ HARPLEKTAĴOJ

Dabancheng, urbeto administrata de Urumqi, areo malpli ol 5 000 kvadratajn kilometrojn kaj havas pli ol 20 000 loĝantojn ujugurajn, hanajn, kazahajn, hujajn k.a. Ambaŭflanke de ĝia nelonga ĉefstrato estas sidejo de la urbeto registaro, poŝtoficejo, barbarejoj, restoracioj kaj bazaroj. Bedaŭrinde, ni renkontis neniun knabinon kun longaj harplektaĵoj en la strato. Mi vizitis barbarejon. La barbirino estas juna kaj altastatura kun mallongaj haroj kaj en laŭmoda vesto. Ŝi diris, ke nun la knabinoj de la urbeto estas snobemaj. Multaj el ili estas jam frizitaj. Tial malmultas knabinoj kun longaj harplektaĵoj.

Antikve Dabancheng estis strategie grava loko kaj ĝi famas pro sia prospero en historio. La norda branĉo de la Silka Vojo en Xinjiang (Ŝinĝjang) trairis la lokon. Tiam, tie estis 4 urbetoj kaj


pluraj alarmturoj. Pli ol 1 000 jaroj forpasis. La alarmturo videble konstruita el tero kaj fragmitoj apud la vojo fariĝis nun termaso alta je malpli ol 5 m. Kaj la urbeto Baishui, sufiĉe granda siatempe, havas nun sian kvadratan murbazon el sablomasoj altaj je pli ol unu m. Ĉie en kaj ekster ĝi estas ovalaj ŝtonoj kun grandeco de pugno. La rivero Baishui murmuris ekster la murbazon.


Nun laŭ la Silka Vojo en Xinjiang etendiĝas ŝoseoj kaj fervojoj al suda Xinjiang kaj aliaj lokoj, la konstruita ekspresa aŭtovojo inter Urumqi kaj Turpan, komunikaj lineoj, telekomunikaj fotokabloj kaj tuboj por petrolo kaj naturgasoj.

VENTO EN DABANCHENG

Vojaĝante en Dabancheng, ni vidis, ke sur la vasta kaj sterila tereno inter 2 montoj staras dekoj da blankaj “gigantoj” kun rado malrapide turniĝanta surkape. Ili estas vento-energiaj radoj. En la urbo


SKEMA MAPO DE LOKOJ ĈE SILKA VOJO







Riparado de generatore

Transformatora stacio



Vent-radoj





En regadejo de vent-energiaj generatoroj



En vespera krepusko



Ruino de la antikva urbo Baishui

Ruino de alarm-turo



funkcias la plej granda vento-energia elektrejo de Ĉinio.

Dabancheng situas en la valo inter la meza kaj orienta branĉoj de Tianshan-montaro, kun longo de 80 km de oriente okcidenten kaj larĝo de 15-30 km de norde suden. Malvarma aerfluo el Siberio en nordo kaj la varma el dezerto en suda Xinjiang renkontiĝas en la valo kaj formas venton, kiu forte blovas al Dabancheng tra la vento-zono kun areo de 1 600 kvadrataj kilometroj.

En Dabancheng ventas senĉese dum la tuta jaro. Posttagmeze la vento blovas pli kaj pli forte kaj je la 4-a kaj 5-a matene ĝi blovas plej milde. En Dabancheng pli-ol-1 000-kvadratkilometra vento-zono taŭgas por funkciigi vento-energiajn radojn. La jara vento-energia rezervo atingis 25 miliardojn da kWh.

En Dabancheng, la nodo de trafiko kaj telekomuniko por suda kaj norda Xinjiang, funkcias 2 elektrodrataj retoj, per kiuj oni liveras elektron al suda kaj orienta Xinjiang.

NOVA ENERGIBAZO

Matene, mi vidis la “gigantojn” silente stari sur la vento-zono. En la loko je 500 m for de la ŝoseo estis vento-elektrejo. Maldekstre de ĝia enirejo estis duoncirkla regadejo. Meze de ĝi instaligis komputere regata sistemo. Tra vitromuro mi vidis, ke padeloj de kelkaj vento-energiaj radoj turniĝas malrapide.

“Jen estas magia forto de la vento en Da-

bancheng”, diris al mi inĝeniero Wei Chunli. 30-jara li jam estas veterano de tiu elektrejo. De li mi informiĝis, ke antaŭ 10 jaroj tie estis nur malgranda eksperimentejo. Uzante vento-energiajn maŝinojn importitajn el Nederlando kaj Danlando, kelkaj homoj en ĝi provis elektro-produkton per vento. En la fino de 1992 ekfunkciis la Dabancheng-a Vento-energia Elektrejo. Ĝi kun 33 generatoroj produktas jare elektron de 35.81 milionoj da kWh.

En tiu vento-energia elektrejo tute fermita estas regadejo, tensialtiga stacio, laborejo por maŝinmuntado, laborejo por elektra eksperimento, oficejo kaj loĝkvartalo. La vento-energiaj radoj kaj tensialtiga stacio estas regataj de komputeroj. En la vento-energia elektrejo laboras entute 22 personoj. Ili ĉiuj estas fakuloj, kiuj finis la lernejan studon antaŭ nelonge. Ordinare ili faras fakan esploron en oficejo kaj, kiam vent-radoj misfunkcias, ili riparas ilin eksterdome. Ili mem preparas manĝaĵojn. Vespere, ili ludas kartojn aŭ tablotenison, iafoje, trinkas bieron en malgranda restoracio je unu km fore. Ili traktas unu alian kiel fratoj.

Nia ĵipo veturis inter la “gigantoj”. La ventorado altas je 30 m kun la bazo ĉirkaŭbrakebla kune de 3 homoj. Sekvante junulojn, mi singardeme suprengrimpis “giganton” laŭ la fera ŝtuparo. Sur la plato en ĝi, kiu povas enteni 4-5 homojn, mi vidis, ke ĉiu padelo longas je pli ol 10 m. Mi ne povis imagi, kiel ili tiel facile turniĝas en vento.

Almontrante al konteneroj malproksime, iu junulo diris al mi: “En ili estas padeloj por gene-



Trajno veturanta en dezerto



Knabino de Dabancheng

Loĝdomoj





Riĉa rikolto de sojfaboj en Dabancheng

ratoro kun povo de 600 kW importitaj el Danlando. Antaŭe Ĉinio importis ĉiujn pecojn de vento-energia rado el aliaj landoj. Nun, ĝi kapablas produkti ŝtalajn pecojn, tur-strukturon kaj platon de vento-energia rado kaj ĉiujn pecojn por generatoro de 300 kW.”

BONA KOMENCO

Sur turo de ventorado apud la ŝoseo okulfrapas vortoj : “Produkti elektron per vento, por protekti la medion.” Probable, kiam antikvaj komercistoj vojaĝantaj laŭ la Silka Vojo plendis kontraŭ la ventego kaj la malfacila vojo en Dabancheng, ili absolute ne imagis, ke post pli ol 1 000 jaroj la vento, kiun ili abomenis, utilis por la homaro.

De la lastaj jaroj oni pli kaj pli klare komprenis, ke la medi-protektado estas grava por la homa ekzistado. Pro tio, la tuta mondo esploras kaj utiligas energiojn sunan, ventan, tervarman kaj aliajn. La kosto por vento-energia elektroproduktado estas malalta, tial la produktado disvolviĝas plej rapide.

Kompare kun la landoj evoluintaj en utiligado de vento-energio, Ĉinio estas malforta, tamen

ĝi havas bonan komencon. Fakte, vento-energio estas vaste uzata en Ĉinio. En la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio, nordorienta Ĉinio kaj ĉemaraj regionoj de sudorienta Ĉinio troviĝas vento-energiaj elektrejoj. En la Interna Mongolio vento-energia elektro servas ĉefe al la vivo kaj produktado de la paŝtistoj loĝantaj dise. La elektro-produkta tempo de la Dabancheng-a Vento-energia Elektrejo konsistigas pli ol 84% de tiu de la tuta jaro. La kurbo de taga ŝarĝo kaj tiu de la sistema estas preskaŭ samaj, en kulmino de elektro-uzado vento-povo kaj elektro-kvanto estas plej grandaj. Kvankam la elektro produktita per vento-energio konsistigas nur 1% de tiu de la elektrodrotaj retoj, tamen ĝi ludas gravan rolon en regulado sur la reto. Akvo-pumpado per vento-energia elektro ebligas transformi dezertojn kaj disvastigi herbejojn utilajn al brutobredado.

La direktoro de la elektrejo diris al mi, ke en 2000 la generatora kapacito de la Dabancheng-a Vento-energia Elektrejo atingos 100 000 kW. Tiam, aperis en mia imago la sceno: En la loko, tra kiu pasis la Silka Vojo, centoj da ventoradoj staros en vicoj sur verda stepo, inter aroj kaj aroj da paŝtiĝantaj ŝafoj kaj bovoj... ■

VI ALVENOS

*mi pleje timas
ke vi alvenos sed jam tardos
ne havos pomojn mia pomarbo
kaj mi nenion povos
al vi proponi*

*mi pleje timas
ke vi alvenos sed jam tardos
la rivero glaciigōs
kaj mi ne povos
veturigi vin en mia boato
kvankam la boaton
mi ankoraŭ havos*

*mi pleje timas
ke vi alvenos sed jam tardos
...mi solas
en mia boato
plenigita per aromaj pomoj*

MI STARAS KAJ ATENDAS

*mi jam venis al vi
sed vi havas ankoraŭ nokton
mi staras*

*ĉe via sojlo
kaj atendas
kiam la tago leviĝos*

*ja kiam la tago leviĝos
vi rigardos*

*tra la fenestro
kaj ekvidos
ke mi jam staras
ĉe via sojlo*

*mi staras ĉe via sojlo
sed ne frapas la pordon
ĉar ankoraŭ estas nokto
kaj nokte*

*vi tutegale
ne rekonos min*

*mi staras kaj atendas
kiam la tago leviĝos*

TREZORAJ MINUTOJ

*iom da tempo mi ne moviĝis —
trezoraj minutoj...*

birdoj al kutimiĝis al mi

kvazaŭ al arbo

*ili ĉesis timi
ili vagis proksime
ili preskaŭ sidiĝis
sur miajn brakojn
kvazaŭ sur branĉojn*

*tamen la homo ne povas
longe resti senmova
kaj mi ekpaŝis —
la birdoj
fuĝe
disflugis*

*mi iras
mi tretas herbojn florojn
mi iras
mi tretas formikojn skarabojn*

*ja aliel ne eblas
se oni moviĝas*

MEVOJ

*tie kie mi loĝas
estas nek maro nek mevoj*

*mi vidis la mevojn
nur en filmoj kaj sur bildoj
sed en la filmoj
kaj sur la bildoj
la mevoj ĉiam
flugas super la maroj*

*do kiam mi trafis
en fiŝistan vilaĝon
mi la unuan fojon ekvidis
kiel tiuj mevoj serĉas nutron
sur bordo
sur kortoj
eĉ sur rubejo
kiel ordinara hejmobirdo*

*mi ne riproĉas ilin
sed mi devas konfesi
ke min surprizis tiu vidaĵo
ja mi al kutimiĝis
ke la mevoj ĉiam
flugas super la maroj*

*La aŭtoro naskiĝis en 1934 en Ukrainio. Li skribas ukraine, pole, sed lastatempe nur Esperante. Poemoj en E-to aperis en "La Flugfolio", "Litova Stelo", "Fonto" kaj "Monato".

BONA KURACISTO DE ARBOJ

Antaŭ dekkelke da jaroj junipero pli-ol-500-jara en la Parko Ĉiela Altaro, Pekino, velkis. Iuj proponis forhaki ĝin kaj aliaj — savi ĝin, ĉar tre valora estas tiu ĉi junipero. Sed neniu estis certa, ĉu ĝi povos esti savita. Li Jingling, supera inĝeniero de la Pekina Ĝardenistika Instituto, akceptis la taskon. Bone diras ĉina popoldiro, ke oni donas efikan recepton nur trovinte kaŭzon de la malsano. Por tio li vizitis ĉiujn grandajn parkojn en Pekino, prenis specimenojn kaj analizis ilin. Fine li trovis, ke la arbo ne povis enradikiĝi en la tero kompaktiĝinta kaj netralasiva pro tretado de tro multaj turistoj. Ĉirkaŭ la arbo li faris fosajon profundan je unu m kaj enterigis en ĝin kunligitajn branĉojn por malkompaktigi la teron kaj tralasi aeron. Post kelkaj jaroj la enterigitaj branĉoj fariĝis huma materio, kiu produktas organikan acidon, sekve de tio la tero estis pli nutra kaj tralasiva. Jen la antikva junipero reviviĝis. El ĝi elkreskis novaj branĉoj kaj

folioj.

Poste, Li Jingling komencis sisteman esploradon pri revivigo de antikvaj arboj. Li fariĝis vera kuracisto de arboj simile al sperta ĉin-medicina kuracisto, kiu faras detalajn observojn kaj analizojn ĉirkaŭe de ĉiuj antikvaj arboj en Pekino pri iliaj akva, tralasiva kaj polucia statoj, kaj ankaŭ pri la stato de lumŝirmado, sterko kaj plantmalsanoj, kaj post tio li faras kuracrimedojn. Li, imitante pegon, trapikas ŝelon de la arboj por trovi tie loĝantajn fiinsektojn... Kuracite de li, antikvaj pinoj, ginkoj kaj sovaĝaj jujubarboj reviviĝis unu post alia.

PLEJ INFLUA ELDONEJO EN ĈINIO

La Komerca Presejo estas la plej influa el la ĉinaj eldonejoj.

En la 11-a de februaro 1897 la nomita presejo naskiĝis en Ŝanhajo. Ĝiaj fondintoj estis kompostistoj de ĵurnalejo. Komence la presejo faris nur komercajn presaĵojn, kiaj reklamoj, notlibroj kaj kontlibroj, tial ĝi estis noma-

Li Jinling



ta Komerca Presejo.

En la komenco de la 20-a jarcento entreprenisto Zhang Yuanji, klerigita de la ĉina kaj okcidenta kulturoj kun reformisma penso, aliĝis al la presejo kaj dank' al tio la presejo rapide disvolviĝis el simpla presejo en eldonan stablon konsistantan el redaktejo, tradukejo, presejo, distribuejo kaj instituto. Ĝia unua kontribuo al la ĉina kultura afero estis eldono de grandnombraj lernolibroj. En 1903, kiam en Ĉinio aperis unuaj modernaj lernejoj, ĝi kompilis kaj eldonis la unuan ĉinan elementlernejan lernolibron, kiu vendiĝis je milionoj da ekzempleroj en dekoj da jaroj. Ĝia alia kontribuo estis konigi al la ĉina socio famajn okcidentajn verkojn inkluzive de "Evoluismo" de Thomas Henry Huxley. Ĝia tria kontribuo estis kompili vortarojn, kia "Ciyuan", granda referenca libro en la moderna Ĉinio. La de ĝi eldonitaj referencaj libroj influis plurajn generaciojn de ĉinoj. Ekz. distribuiĝis 300 milionoj da ekzempleroj de la malgranda Vortaro Xinhua, kiu vidiĝas preskaŭ en ĉiu hejmo en Ĉinio. Krome, la Komerca Presejo malkovris, kulturis kaj unuigis nombron da eminentuloj en la moderna Ĉinio, inter kiuj estas famaj esperantistoj Bakin kaj Hujucz.

En la pasintaj cent jaroj ĝi eldonis sume librojn kun ĉ. 30 000 titoloj kaj dekojn da periodaĵoj. Nun ĝi sin dediĉas al eldonado de Libro Kolekto de Ĉinigitaj Mondfamaj Akademaj Verkoj kaj jam eldonis 300 verkojn.

ASTROIDO TANĜANTALA ORBITON DE LA TERGLOBO

En la jarkomenco la Pekina Observatorio trovis asteroidon proksiman al la tero kaj donis al ĝi la nomon 1997 BR. 22 observatorioj de la mondo observis ĝin kaj venis al la konkludo, ke ĝia diametro estas ĉ. 1-2 km, ĝia orbito estas tanĝanta tiun de la terglobo kaj la plej mallonga distanco inter ĝi kaj la terglobo estis nur duoble kiom tiu inter la sinkrona satelito kaj la terglobo.

S-ro Wang Sichao, esploristo de Zijinshan-observatorio de Nankino, konigis, ke en la kosmo ĉ. 2 000 asteroidoj kun diametro de pli ol unu km rotacias proksime al la rivoluca orbito de la terglobo, tamen, ĝenerale dirite, oni ankoraŭ ne konas iliajn verajn fizionomiojn. Ĝis nun oni trovis nur 3 asteroidojn, kia 1997 BR, tanĝantajn la orbiton de la terglobo. Ke as-

troidoj koliziis kun la terglobo, tio probable okazis unufoje meznombro en ĉiu centmila aŭ tricentmila jaro. Tio kaŭzis grandan katastrofon, tamen ne ruinigis la terglobon. Matene de la 30-a de junio 1908 asteroideo kun diametro de 60 m koliziis kun la terglobo, eksplodis en Siberio de Rusio kaj forbruligis antikvajn arbarojn en areo de 2 000 kvadrataj km.

Por preventi katastrofon far tiuj "neaten-ditaj gastoj" al la terglobo astronomoj kun plena atento observas la movon de tiuj asteroideoj, prikalkulas iliajn orbitojn kaj ĉiarimede malhelpas kolizion de ili kun la terglobo.

DOMOJ TRANSLANDAJ

Malgranda Maba-vilaĝo de jaŭ-oj en sud-okcidenta Ĉinio situas ĉe la limo inter Ĉinio kaj Laoso.

En marto 1992, kiam Ĉinio kaj Laoso mezuris kaj difinis la landlimon, oni trovis, ke la kabano de jaŭ-a kamparano Li Minzhong etendiĝas 5 m en Laoson, alivorte, la landlimo ĝuste trairas lian domon. Rezulte la kabano kun areo de 50 kvadrataj metroj duone estas en Ĉinio kaj duone en Laoso, kaj la kolono en la centro de la domo funkcias kiel "landlima ŝtono".

Iun tagon mi vizitis la kabanon kaj sidiĝis en la ĉina parto. Baldaŭ la gastama mastro alportis teon el la laosa parto. La enirejo de lia domo estas en Laoso tamen la ŝtuparo en Ĉinio. Li Minzhong vivas neriĉan vivon. Li ne fieras pri la aparta situo de la domo, ununura en Ĉinio. Li deziras nur bonhavan vivon. Sed finfine la situo ŝanĝis lian vivon. La pordo de lia domo rigardis al Laoso antaŭe, kaj poste li malfermis novan pordon en Ĉinio kaj oni eniras lian domon kaj eliras el ĝi.

Post kiam la "translanda familio" estis raportita de la gazetaro, iuj scivolemuloj veturis tien por sperti unutagan translandan vojaĝon sen vizo, kaj iuj filatelaĵ-kolektantoj skribis al Li Minzhong por peti lian subskribon sur la koverta.

En la elementa lernejo de Maba-vilaĝo estas 20 lernantoj kaj unu instruisto. La ligna muro inter la ĉambroj de la 2-a kaj 4-a klasoj ĝuste estas landlimo inter Ĉinio kaj Laoso. Kaj tiel ĝi fariĝis vere translanda lernejo.

XIAO DONG:

Antikvaj libroj en rapida reordigo

ĈINIO havas 55 nacimalplimultojn, ĉiu kun longa historio kaj brila kulturo. Al ili ne mankas antikvaj libroj. Ĉiuj tiuj libroj, ĉu manskribitaj, ĉu presitaj, estas trezoro de la ĉina kulturo.


Laŭ nekompleta statistiko farita en 1984, Ĉinio posedas pli ol 10 000 volumojn da antikvaj ĵi-lingvaj libroj, la tibet-lingvajn librojn kun almenaŭ 10 000 titoloj kaj la mongol-lingvajn kun ĉ. 1 500 titoloj. Kaj krome, ĝi

havas ankaŭ pli ol 1.5 milionojn da antikvaj manĉur-lingvaj libroj. Temante pri politiko, filozofio, juro, historio, religio, lingvistiko, literaturo, medicino, astronomio k.a., ili konigas la evoluon de ĉiuj nacimalplimultoj kaj ankaŭ ĉiujn iliajn kulturajn kreaĵojn. Tio estas tre valora pot studo la historion kaj kulturon de ĉinaj nacimalplimultoj.

Pro historiaj kaŭzoj kaj apartaj sociaj kondiĉoj, multaj antikvaj libroj de ĉinaj nacimalplimultoj

estis nekonataj por longa tempo. Iuj eĉ ekzistas nominale. Sekve, kolekti, reordigi kaj eldoni antikvajn librojn de ĉinaj nacimalplimultoj estas grava laboro multe atentata de la ĉina registaro. De la lasta duonjarcento la laboro progresas iagrade. Post 1984 en Ĉinio 24 provincoj, aŭtonomaj regionoj, municipoj kaj 139 subprovincoj kaj subregionoj ekhavis organizaĵon por reordigi antikvajn librojn de ĉinaj nacimalplimultoj kaj pli racie uzis homfortojn

Antikvaj libroj en Dongba-lingvo





Reordigo de antikvaj libroj de la ĵi-a nacio

kaj monrimedojn tiurilate.

Inter 1986 kaj 1995 laborantoj de la ŝtataj kaj nacimalplimultaj organizaĵoj por reordigi antikvajn librojn vizitis popolajn artistojn en vilaĝoj kaj sur paŝtejoj, kolektis grandan nombron da antikvaj dokumentoj kaj eldonis librojn kun pli ol 3 000 titoloj de ĉ. 40 nacimalplimultoj. Ili ankaŭ traktis teknike antikvajn librojn difektitajn pro malsamaj kaŭzoj. Iuj el tiuj libroj havas altan valoron por akademia esploro kaj sensaciis la ĉinan akademian rondon. Ili estas la famaj epopeoj “Aŭtobiografio de Reĝo Gesar” de la tibeta nacio; “Ĝanger” de la mongola nacio kaj “Manas” de la kirgiza nacio; “Ĉina Katalogo de Manĉurlingvaj Libroj” de Pekino; “Katalogo de Klasikaj Libroj en Potala-palaco” de Tibeto; kaj “Glosaro de Antikvaj Dongba-sutroj” de la naŝia nacio.

La supre dirita reordigo fundamentis esploradon de historio, etnologio, lingvistiko, literaturo kaj multaj aliaj fakoj. La skriblingvo Dongba de la naŝia nacio en Yunnan-provinco estas la plej perfekta kaj plej longe uzata hieroglifo de la mondo. Ĝi kaj la

skribo sur ostoj kaj testudaj ŝeloj en la periodo de la 17-a ĝis la 11-a jc a. K., elterigita en Anyang de Henan-provinco, estas rigardataj kiel raraĵoj de la antikva ĉina skriblingvo. La skriblingvo Dongba, kiu formiĝis en Tang-dinastio (618-907), estis uzata dekelkajn jc. Eĉ hodiaŭ iuj naŝiaj maljunuloj kapablas legi kaj skribi en ĝi. Dongba-sutroj de la naŝia nacio, verkitaj en Dongba-lingvo, estas uzataj kiel rara dokumento por esplori la naskiĝon, evoluon kaj disvolviĝon de la homa skriblingvo. Granda kvanto da historiaj dokumentoj konserviĝas en la Unua Halo de Historiaj Arkivoj de Ĉinio, Imperiestra Palaco de Shenyang kaj biblioteko de Taibei kun klasikaj aktoj de la kortego de Qing-dinastio (1644-1911) kiel la ĉefa enhavo. Ili ampleksas aŭtografojn de imperiestroj, paperojn prezentitajn de korteganoj, arkivojn kaj dokumentojn de kortegaj departementoj kaj uziĝas kiel gravaj materialoj por esplori la historion de la dinastio. La libro “Odo al Salman-dio”, manskribita en la sibo-a lingvo kaj malkovrita de Xinjiang (Ŝinĝjang)-aj fakuloj en la Sibo-nacia Aŭtonoma Gubernio, aperis en 1885. Kiel rara

dokumento de Salman-religio, ĝi konigas komplete multajn diversajn ceremoniojn de la religio. Direblas, ke per reordigo de antikvaj libroj de ĉinaj nacimalplimultoj oni ne nur plenigis la blankojn en esplorado de antikvaj historio kaj kulturo de nombro da nacimalplimultoj, sed ankaŭ prezentis aŭtentikajn materialojn por esplorado tiufanka kaj klarigis nemalmultajn faktojn de la antikva ĉina historio.

Farendas multo por kolekti kaj reordigi antikvajn librojn de la ĉinaj nacimalplimultoj. I.a., interpunkciado, korektado, transkribado laŭ la internacia fonetika alfabeto kaj glosado, kiel koneksa fako pli-malpli ampleksanta historion, dokumentologion, etnologion kaj arkeologion, devas esti farataj de multsciaj fakuloj. De 1986 la Centra Nacia Universitato de Ĉinio ĉiujare funkciigas kursojn pri reordigo de antikvaj libroj de ĉinaj nacimalplimultoj kaj elkulturis multajn fakulojn por diversaj lokoj de Ĉinio. En 1993 ĝi instalas fakon pri antikvaj libroj de ĉinaj nacimalplimultoj. Nelonge poste, la diplomitoj eklaboros kiel nove bakitaj fakuloj tiufankaj. ■

Plukado de te-folioj



Ceremonio kaj moro pri teo

de JIANG MING

ĈINOJ ŝatas teon. Por gastoj, taso da teo taŭgas pli ol varmaj salutvortoj. Ĉinio estas hejmloko de teo. Laŭ notoj en antikva medicina libro, Shennong, iniciatinto de la primitivaj ĉinaj agrikulturo kaj medicino, “gustumis centon da herboj. Iun tagon lin trafis 72 venenoj, kaj poste lin sentoksigis teo.” En antikvaj tomboj en Hunan- kaj Hubei-provincoj estis malkovrita teo de 2 mil jaroj. En la vasta kaj multnacia Ĉinio troviĝas sen nombraj tetrinkaj moroj formitaj en la kelkmil-jara tetrinka historio. Sube ni iom traktos pri tio.

PRI BAMBUTUBA TEO

La Yunnan-Guizhou-a Altebenaĵo, sudokcidenta Ĉinio, estas primitiva produkitejo de teo. Tie printempo etendiĝas kvazaŭ tra la tuta jaro. Oni regalas gastojn ĉiam per ĵus plukitaj kaj bakitaj tefolioj. Kiam la gastoj eniras en taj-an bambuan etaĝdomon, knabino en tubjupo akceptas ilin. Ŝi metas nove plukitajn tefoliojn en nove hakitan bambuan tubon, bakas ĝin sur fajro kaj poste infuzas tiel bakitajn tefoliojn.

En la Printempa Festo la loĝantoj sude de Yangzi-rivero regalas gaston per teo kun du tranĉitaj verdaj olivoj aŭ oranĝaj pecoj, similaj al antikva monero, kiu simbolas favoran aŭspicion kaj riĉiĝon.

La loĝantoj de la Centra Ebenaĵo akceptas novan vizitanton tri-foje per teo: Je la unua fojo estas bonvenigo. La gasto nur iomete trinkas la teon, ĉar tiam ĵus komenciĝas la konversacio, kaj ankoraŭ ne aromas la teo; je la dua fojo estas ĝui la teon. Tiam varmas la konversacio kaj aromas la teo; la tria fojo estas signo de adiaŭo. Tiam baldaŭ finiĝos la konversacio kaj iom post iom malaperos la aromo de la teo.

Antaŭ 1 300 jaroj la moro trinki teon disvastiĝis de la Centra Ebenaĵo al nordokcidenta Ĉinio. Tie mankis legomoj kaj fruktoj.



Servistinoj en te-trinkejo

La nomadoj sin nutris ĉefe per lakto kaj viando. Ĉar teo ne nur akcelas digeston kaj mildigas grasecon, sed ankaŭ aldonas vitaminojn, baldaŭ la nomadoj ekŝatis teon kaj ekhavis la kutimon “ŝanĝi ĉevalon kontraŭ teo aŭ inverse”. Tamen tie regas sekeco, do paŝtistoj ne tiel atentis la kvaliton de akvo kiel la loĝantoj sude de Yangzi-rivero. Konforme al la lokaj kondiĉoj, ili infuzas teon per lakto aŭ butero kaj por regali gaston kaj por ĉiutaga trinkado. Se gasto donacas al gastiganto brikon da teo, por la lasta tio estas la plej valora donaco.

1 000 jarojn antaŭe, la nord-orientaj ĉidan-oj, adorantaj la sunon, fondis Liao-dinastion. Ili ne nur prenis tetrinkadon kiel unu el la kortegaj ceremonioj, same kiel la praa imperiestro de la Centra Ebenaĵo, sed ankaŭ oferis teon al la suno en sunkulta ceremonio.

GEEDZIĜO KAJ TEO

Antikvaj ĉinoj opiniis, ke tearbo ne vivas post transplantado, kaj geamantoj devas esti lojalaj kiel tearbo. Tial novgeedzoj devas trinki teon, kaj hodiaŭ sudaj ĉinoj ankoraŭ nomas geedziĝon “tetrinkado”. En nupto de baj-oj de Yunnan-provinco, teo okupas gravan lokon: Inter la donacoj de fianĉo por fianĉino troviĝas teo; en geedziĝa vespero la novgeedzoj devas regali la gastojn tri-foje per teo, malsame ol prezento de tri fojoj da teo de la Centra Ebenaĵo. Ĉi tie oni regalas gastojn per teo amara, dolĉa kaj gusto-reveka, nome gustumigi al ili unue amaron kaj poste dolĉon por deziri al ili mielan vivon.

La nacimalplimulto de okcidenta Hunan-provinco havas gefianĉiĝan moron kanti sur temonto. Meznokte, gejunuloj venas en la monton, kie ili plukis tefoliojn tage, kaj kantas pri sia amo ĝis tagiĝo.

Sur la Qinghai-Tibeta Altebenaĵo cirkulas la popolkantho “Han-a teo eniris en Tibeton”,

kiu esprimas dankon kaj laŭdon al la han-aj te-transportantoj. La kutimo trinki teon de tibetanoj originis el la han-tibetana geedziĝo en la mezo de la 7-a jarcento. Tiam princino Wencheng de Tang-dinastio edziniĝis al Sunzamkam-po, reganto de Tubo-regno. Ŝi tien portis ne nur terkulturan kaj tekstan teknikojn, sed ankaŭ teon kaj teservicojn. La menciita kanto tekstas jene:

*Iom da teo vi metas,
iom da butero mi metas.
Por scii ĉu ni estas unuanimaj,
gustumi la buteran teon
bonvulu.*

*Ja estas princino, kiu alportis
la tason kun draka desegno;*

*Vidante la tason, tuj ni memoras
favoron de milda princino*

AKVO KAJ TESERVICO

La ĉinoj zorgas pri la kvalito de teo por regali gastojn. Ili opinias, ke bonkvalita teo estas kvietiga. Tamen ĝi estas bona ne nur en tio. Antikvuloj diris, ke “bonkvalita teo disportas aromon nur per akvo”, kaj “nedolĉa akvo difektas la aromon de teo, do oni plej zorgas pri elekto de akvo.” Ili opinias, ke por infuzi teon la plej bona akvo estas tiu el monta fonto, la dua bona — tiu el rivero, kaj la malplej bona — tiu el putro. Iuj antikvuloj havis la kutimon infuzi teon per boligita neĝakvo.

Por pura, aroma teo oni devas uzi delikatan teservicon. Bela teservico mem estas artaĵo, kiu servas ne nur kiel trinkilo, sed ankaŭ kiel rigardindaĵo.

Estas racie infuzi malsamspecajn teojn per malsamaj teservicoj. La valora verda teo povas plene montri sian helkoloran kaj delikatan aromon nur en senkovrila vitra glaso. La jasmena teo konservas siajn aromon kaj koloron en kovrilhava porcelana taso. La kruda argila kruĉeto estas taŭga por dens-odora bruna teo. Pli bone estas infuzi simple elektitan teon

en kruĉo kun filtrilo, por ke estu flarebla la aromo kaj nevidebla la formo de la tefolio. Krome, en luksa domo decas uzi arĝentan teservicon, kaj en kabano estas pli bone uzi stanan ĉerpilon kiel trinkilon.

TEDOKTRINO KAJ ĜIA DISVASTIĜO

En la komenco teo aroma kreskinta en profunda monto kaj ĉe pura rivero estis uzata de ĉinoj kiel kuracilo. Antikva medicina libro diras, ke teo kuracas ĉefe fistulon, mildigas soifon kaj dormemon kaj utilas al digesto, diurezigo, klarvidado kaj cerbumado. Oni eĉ nomas ĝin “panaceo”. Poste la kleruloj strebantaj al neordinara vivmaniero, la senzorgaj taoistoj kaj bonzoj, ili ĉiuj komprenis multe el trinkado de teo. Ili rigardis infuzon kaj trinkadon de teo kiel elegantan ceremonion por memkulturo. Tiel formiĝis la tiel nomata tedoktrino.

La ĉina tedoktrino postulas purigi, infuzi, filtri kaj konservi teon per 24 specoj da servicoj, opiniante, ke tiel oni povas bone koni ĝian esencon.

En longa historio la ĉinaj tedoktrino kaj moro pri teo disvastiĝis en iujn landojn kaj regionojn, kunfandiĝis kun la loka vivo kaj ekhavis lokajn karakterizaĵojn.

Ekde la 7-a jarcento, japanaj bonzoj studentaj en Ĉinio alportis al sia lando la ĉinajn budhismon kaj semon de teo kaj instruis al siaj samlandanoj la arton infuzi teon, ceremonion trinki teon, dekoradon de tetrinkejo. Ekde tiam ankaŭ la japanaj bonzoj trinkas teon antaŭ meditado, amikiĝi kaj prediki kun akompano de teo, same kiel la ĉinoj. Ili fariĝis la plej fruaj tiufankaj fakuloj de Japanio. Kaj nun en Japanio ankoraŭ konserviĝas 20 el la 24 specoj da teservicoj de Ĉinio. ■



“Ek!”



Vilaĝa fotisto

Teksto kaj fotoj de JIAO BO

Fotisto Li Tianbing havas rezolutan karakteron.

Li loĝas en malnova domo en montvalo 1.5 km for de la vilaĝo en Fujian-provinco, suda Ĉinio. Kiam li estis 12-jara, en la vilaĝon venis fotisto kun fotilo. Li interesiĝis pri fotilo kaj rivelado. Li do helpis la fotiston en vektportado. Nelonge poste, la fotisto adept-

Li Tianbing iras aliloken kun fotilo.





Li Tianbing fotas elementlernejanon.

tigis lin. Li Tianbing eklernis de li fotadon kaj riveladon. Kelkajn monatojn poste, kiam la fotisto forlasis la vilaĝon, li jam bone posedis la teknikon.

Por fariĝi fotisto, Li Tianbing ŝtele vendis bovon de sia familio kontraŭ 70 juanoj kaj per la mono aĉetis malnovtipan fotilon faritan de Britio. La patrino riproĉis lin pro tio.

En la pasintaj 50 jaroj li fotis multajn vilaĝanojn per la fotilo.

Ankaŭ lia filo estis fotisto de la vilaĝo. Poste li eklaboris kiel profesia fotisto en la guberniurbo. Li uzis modernan fotilon kaj estis plurfoje premiita en foto-konkurso. Li Tianbing tamen diris: "Ankaŭ miaj fotoj estas bonaj."

Rivelado



Instruistoj en infanĝardenoj

Teksto de GU JUN


Fotoj de ZHOU XUEZHONG

EN ĉiu 4-cento da geinstruistoj de la infanĝardenoj kaj infanvartejoj en Ŝanhajo estas unu instruisto. Materialoj konigas, ke komence de la 20-aj jaroj, kiam burĝonis ĉina pedagogio, laboris en ŝanhaja infanĝardeno instruisto Zhang Zonglin. Li ne nur profunde studis pri pedagogio, sed ankaŭ fondis infanĝardenon. Tamen en multaj jaroj post tio en la infanĝardenoj laboris nur instruistinoj. Sed nun tie laboras ankaŭ instruistoj, kvankam nemultaj.

Antaŭ 9 jaroj Pan Haohan eklaboris kiel instruisto en infanĝardeno.

Iuvespere, kiam li lernis en normala sportlernejo, li kaj lia kamarado diskutis pri estonta laboro post diplomitiĝo.

Instruisto Pan kuraĝigas la knabon.



“Kie vi laboros?”

“Mi laboros tie, kie multas instruistinoj.”

“Kompreneble, en infanĝardenoj multas instruistinoj.”

“Do, mi laboros tie.”

“Vi do ne perfidu vian promeson,” oni opiniis, ke Pan nur ŝercis.

“Dirite, farite.” Pan ja fariĝis serioza.

Ĝis nun Pan jam laboris 9 jarojn en infanĝardeno. En la tago, kiam mi vizitis lin, li estis gvidanta infanojn en ludo sur bambua ŝtuparo projektita de li mem. Komence li metis la ŝtuparon surteren kaj petis la infanojn iri sur ĝi unu post alia. Poste li ĝin levis iom post iom, super la tero je 50 cm, je 80 cm... kaj fine je 170 cm. La ŝtuparo estis apogita sur molaj kusenoj. Antaŭ tiu alta kaj skuiĝanta ŝtuparo iuj infanoj ektimis. Tiam Pan diris al ili: “Provu tiuj, kiuj volas. Oni povas rampi sur la manoj kaj piedoj aŭ sur genuoj. Kompreneble, la plej bravaj povas piediri sur ĝi. Mi subtenos vin per mallonga bastono.” Ĉiuj infanoj volis esti kuraĝaj, precipe la knabetoj, kiuj ĉiam deziras montri sian bravecon. Jen, ili suriris la ŝtuparon, subtenate de la instruisto. Kvankam aperis malgrandaj ŝvitgutoj sur ilia rozeta vizaĝo, tamen ili fieris pri sia braveco. Pan diris al mi, ke tiu ĉi ludo postulas neniom da lerteco, sed nur kuraĝon. Kompreneble, s-ro Pan garantiis ilian sekurecon. “Fakte, mi ne subtenis ilin, mi faris nur ŝajnan movon.” Li kreis tiun ludon por ke la infanoj estu kuraĝaj, neniam retiriĝu antaŭ malfacilo kaj faru ĉion eblan por la sukceso. Efektive inter tiuj 100 infanoj, kiuj partoprenis la ludon, 98 sukcese suriris la ŝtuparon je 170 cm super la tero kaj 60 el ili piediris ĝin.

S-ino Feng Lirong, estrino de la infanĝardeno, diris al mi, ke krom la gepatroj ankaŭ la infanĝardenistoj estas la idoloj por la infanoj. Tial, instruistoj, kia Pan, estas tre utilaj al la infanoj en la perfektigo de ilia karaktero. Efektive, dum sia 9-jara praktikado s-ro Pan plene utiligis sian avantaĝon de la vireco kaj donis sian sinceran amon al la infanoj. Li atentis ne nur ekzercadon de ilia korpo, sed ankaŭ kulturon de ilia spirito, funkciigante kurson de luktarto kaj naĝado. Vintre, li kaj la infanoj nur en banŝorto kuris tien kaj reen por sin varmigi. Li ankaŭ aŭskultigis al ili tondrojn por ke ili venku solecon kaj timon.

Kvankam tre malmultas la instruistoj en infanĝardeno, tamen ili multe ekscitas la tieajn instruistinojn kaj iagrade ŝanĝas iliajn konduton kaj labormanierojn prenitajn dum longa tempo. S-roj Huang Song, Fang Zhiming kaj Yang Hongjie estas viglaj junuloj, kiuj eklaboris en infanĝardeno post Pan. La de ili funkciigataj kursoj de sketado kaj vejĉi-o estas multe ŝatataj. Ankaŭ la dekelkaj instruistinoj de la infanĝardeno ekamis sketadon kaj vejĉi-on. La estrino de la infanĝardeno diris, ke oni ne devas ŝarĝi la instruistojn per fizikaj laboroj, nek postuli, ke ili banu la infanojn, sed male, oni devas disvolvi iliajn fortaĵojn, t.e. gvidi la kursojn sportan, ludan kaj kultur-an. En tiu infanĝardeno speciale funkcias nun instrua kaj esplora sekcio. Tio ne nur akcelis konkuron inter la instruistoj, sed ankaŭ forpelis la solecon de la instruistinoj.

Ĉar la viroj estas malmultaj en la infanĝardenoj, tial ili estas alte taksataj. La infanĝardenoj liveras al ili la plej bonajn labor- kaj viv-kondiĉojn, instigas ilin plue studi en altaj lernejoj por ke ili fariĝu pedagogoj en la vera senco de tiu ĉi vorto.

Antaŭ nelonge koncernaj departementoj de Ŝan-



Instruisto Huang instruas glitadon.

Baldaŭ komenciĝos ludo!



hajo faris enketon inter 300 instruistoj kaj gepatroj de la infanoj. La enketo montras, ke 59% de la instruistinoj bonvenigas instruistojn al pedagogio kaj 79% de la gepatroj ĝojas, ke viroj partoprenas la instruadon en infanĝardenoj, ĉar tio estas utila por kulturi virecon en la infanoj. Kompreneble tio estas malfacila, ĉar en la okuloj de iuj ĉinoj la laboron de infanĝardenoj faras ekskluzive virinoj. Viro faras virinan laboron, tio estas malhonora. Laŭdire, antaŭ nelonge iu infanĝardeno en suda Ĉinio volis varbi instruistojn, tamen neniu viro anoncis sin por tiu okupo. Kaj ĝuste tiam iu diplomitiĝinto el la Ŝanhaja Instruista Universitato en vicigis inter la pedagogoj kaj li fariĝis instruisto kun la plej alta klereco en la infanĝardeno. ■

Avineto de infano-leŭkemiuloj



Avineto Hu vizitas resaniĝintan leŭkemiulon, kiu havas nun ĝemelojn.

EN blanka kitelo, ordiginte sian mallongan hararon, ŝi kun rideto eniris en ĉambron de leŭkemiuloj. Ŝi bone scias, ke la infanoj ŝatas ŝian bonkoran kaj intiman mienon. Ili nomas ŝin “Avineto Hu”. Hu Yamei kuracis 50 jarojn. Ŝi havas multajn titolojn dank’ al siaj elstaraj atingoj, inter kiuj la titolo “Avineto Hu” plej plaĉas al ŝi.

Antaŭ 20 jaroj Hu Yamei komencis kontakti junajn leŭkemiulojn. Ŝi rememoras, ke ŝi vidis en la malsanula ĉambro multajn amindajn infanojn senĝene ridantajn, sed post kelkaj tagoj, ili malaperis... “Ĉu leŭkemio estas vere nekuracebla?” Hu Yamei, kiu tiam estis pli-ol-50-jara, neniel povis toleri tian fenomenon. Ŝi fondis studgrupon en la Pekina Pediatria Hospitalo. Post foj-refoja esplorado kaj eksperimentado, laŭ variaj kompleksio kaj simptomoj de la infanoj, la grupo uzis diversajn kurac-metodojn kaj

atingis rimarkindan efikon. Post kuracado 74.4% de la suferantoj de akuta limfata leŭkemio sane vivas 5 jarojn. Tio signifas, ke dum la 5 jaroj en ilia korpo ne troviĝas sangĉelo de patologia ŝanĝiĝo. Nuntempe la monda rekordo atingis 70-80%. Tial Hu Yamei ne kontentas pri sia sukceso. Ŝi esperas savi ĉiujn infano-leŭkemiulojn el la Morto!

Hu Yamei ne nur volas daŭrigi la vivon de ĉiuj infano-leŭkemiuloj, sed ankaŭ donas al ili altkvalitan vivon, kvankam la de ŝi uzataj medikamentoj estas popularaj, tamen ŝi scias ke uzmaniero kaj dozo faras malsamajn efikojn. Tial ŝi senĉese plibonigas la kuracdon, evitante flankefikon kaj plibonigante flegadon. Nun multaj infanoj, kuracitaj de ŝi, vivas sane jam pli ol 10 jarojn kaj 70 el ili jam profesiuliĝis aŭ studas en universitato, 11 el ili edz(in)iĝis kaj 7 patr(in)iĝis. Antaŭ nelonge ŝi ricevis leteron de knabino, kiu

sane vivis 17 jarojn. De la letero ŝi informiĝis, ke la knabino naskis ĝemelojn. Hu kun ĝojo aĉetis donacon kaj vizitis la patrinon kaj infanetojn. Ŝi faris korpan ekzamenon por ili.

Patrino de iu juna leŭkemiulo, kiu loĝas aliloke, diris al mi, ke ŝia infano ne povis daŭre konsulti kuraciston pro manko de mono. Informiĝinte pri ŝia malfacilo, Hu sendis al la patrino monon por veturo kaj invitis ilin loĝi ĉe ŝi. Hu elprenis ŝlosilon de sia hejmo kaj diris al ili: “Vi loĝu ĉi tie kiom longe vi volas.”

Kiam mi demandis Hu Yamei pri tio, ŝi diris; “Mi vere plurfoje pagis por kuracado de infano-leŭkemiuloj kaj oferis sangon al ili. Kiel doktoro, mi bone scias, ke nenio estas pli valora ol la vivo de infano.”

Ŝi amas infanojn kaj ankaŭ estas amata de ili. Iu knabino suferis de leŭkemio en la aĝo de 6 jaroj, post 18 jaroj, ŝi, komplete resaniĝinta, fariĝis elstara fasonistino. Ŝi fasonis belan veston por sia amata avineto Hu. Multaj infanoj donis al ŝi sian propran foton. Laŭ la fotoj Hu Yamei povas korekte nomi ilin. Surstrate, ŝi ofte estas salutita. “Avineto Hu, ĉu vi memoras min?” Antaŭ la iama infano, hodiaŭa plenkreskulo, Avineto Hu petole palpebrumas kaj kun ĝojo diras: “Ho, mi ne memoras vian nomon. Sed estas bone, ke leŭkemio ne memoras vin!”

La plej granda deziro de Hu Yamei estas fondi esplorcentron de infanaj tumoroj, por ke pli da kuracistoj posedu la kuracmetodojn de leŭkemio, pli da junaj leŭkemiuloj vivu sane. ■

Koncernaj materialoj diras, ke de la lastaj jaroj furoras ĉina uŝuo en la tuta mondo. La 18-an de oktobro 1996 iu franca ĵurnalo raportis, ke en Francio ĉ. miliono da loĝantoj amas uŝuon el fora Oriento. Japanio pretendis, ke en Japanio estas miliono da Tajĝjiĉuan-ekzercantoj. En Italio estas centoj da uŝuaj lernejoj. En pluraj jaroj pasintece multaj uŝu-amatoroj vojaĝis al Ĉinio por koni la devenon de uŝuo. La Sveda Uŝu-Asocio havas pli ol 20 branĉojn kun 40 000 uŝu-ekzercantoj el diversaj soci-tavoloj.

Kvankam la ĉina uŝuo vaste ekkoniĝis en la mondo nur antaŭ nelonge, tamen pli kaj pli da homoj rimarkis, ke ĝi ne nur ampleksas multe da branĉoj, sed ankaŭ havas diversajn armilojn. Ĝi distingiĝas per moralaj principoj, medicinaj scioj kaj alte taksas la noblan memkultivecon en la batalo.

Junulo Jack Marat el Kamerunio diligente studis pri la ĉina uŝuo pli ol 10 jarojn. Unue li lernis de ĉina uŝuisto, kiu loĝas en Francio, poste li venis en Ĉinion por lerni en la Shaolin-a Uŝu-ekzercejo en Songshan-monto, fama ĉina uŝua sanktejo. Reveninte en sian patrujon, ankaŭ li starigis Shaolin-an Uŝu-ekzercejon, inter kies diversaĝaj lernantoj estas gardistoj de prezidento, medicinistoj, advokatoj, profesoroj k.a. Ili ĉiuj energie kaj diligente sin ekzercas per uŝuo.

La ĉina uŝuo havas longan historion. En Qin-dinastio (221 a.K.-207 a.K.), post kiam Xu Fu veturis al Japanio, li popularigis la ĉinan skermadon tie, kaj en Tang-dinastio (618-907) la ĉina Nanĉuan-luktarto enkondukiĝis ankaŭ en Japanion kaj poste ĝi fariĝis japana karate-o. Antaŭ 200 jaroj franca predikisto konigis la ĉinajn uŝuon kaj ĉigong-on al Eŭropo. Kiam en Ĉinio regis Qing-dinastio (1644-1911), la ĉina uŝuo

jam populariĝis en Sudorienta Azio.


La ĉina uŝuo estas pli kaj pli vaste ŝatata en la tuta mondo, ĉar dum ĝia ekzercado oni povas ne nur sin fortikigi, sed ankaŭ kulturi sin morale. Pro disvolviĝo de sciencoj kaj teknikoj, oni faras pli kaj pli malmulte da fizikaj laboroj, sekve de tio pli kaj pli simpliĝas movoj de la homa korpo kaj regresas iom post iom la funkcioj de homaj organoj. Antaŭ la nova defio al la homa korpo en la mondo aperis publika sportado. La ĉina uŝuo, precipe Tajĝjiĉuan kaj ĉigong-o, kiuj povas ekspluati la latentajn kapablojn de la homa korpo kaj sanigi la ekzercantojn fizike kaj spirite, estas multe ŝatataj de la publiko, ĉar ili taŭgas por ĉiuj ne limigite de ekzercejo kaj instrumentoj. Dank' al ĉio ĉi la ĉina uŝuo disvastiĝas en diversaj partoj de la mondo.

Oktoobre de 1984, laŭ la invito de la Ĉina Uŝu-Asocio, la delegitoj de Francio, Germanio, Italio, Usono kaj aliaj 8 landoj kaj regionoj renkontiĝis en Ĉinio kaj kune fondis la Internacian Uŝu-Asociacion. Post tio, sinsekve naskiĝis la Eŭropa Uŝu-Federacio kaj Sudamerika Uŝu-Asocio. En 1987 naskiĝis la Azia Uŝu-Asocio kaj en la sama jaro okazis la Unua Azia Uŝu-Ĉampioneca Konkurso.

Uŝuo estas preferata ankaŭ pro sia efika sindefendo. La ĉina uŝuo kun alta batalarto kaj rigora etiko alte taksas sanigon kaj sindefendon, severe prohibas maljustan atakadon. Bone kompreninte la kvintesencon de uŝuo, oni trovis, ke ĝi estas scienco. En ĝia lernado oni povas fariĝi modesta, firmvola kaj progresema. Iu usona uŝu-lernejestro diris, kiam li vizitis Ĉinion, gvidante delegacion: "Iuj lernantoj lernas uŝuon nur por batali, sed ne komprenas la kvintesencon de uŝuo. Pro tio, mi gvidas iujn el ili vojaĝi en Ĉinio por koni la radikon de uŝuo kaj studi pri ĝiaj tradicio, kulturo, filozofio kaj spirito." ■

YI ZHOU:

Ĉina uŝuo tutmonde



Ĉina uŝu-isto kaj lia alilanda lernanto

20 sanigaj ekzercoj (V)

ĈI-SUBE koniĝas la 20-a ekzerco. Ĝi estas utila por malstreĉi la muskolojn de la kruroj, piedoj, maleoloj, kaj por preventi do loreton kaj lacon de la kruroj. Post la ekzerco vi devas fari ankaŭ reguligan ekzercon por ke la tuta korpo reprenu la normalan staton. Se vi ne havas tempon por la reguligado, vi devas fari promenadon kaj neniel tuj ripozi.

20-a ekzerco

Staru rekte kun la manoj ambaŭflanke de la talio.

1. Faru unu paŝon antaŭen per la maldekstra piedo kun la kalkano unue metita sur la plankon (Bildo 31).

2. Faru alian paŝon antaŭen per la dekstra piedo kaj metu vian korpan graviton sur ĝin kun la kalkano levita (Bildo 32).

3. Faru unu paŝon malantaŭen per la dekstra piedo kun la piedpinto unue metita sur la plankon kaj metu vian korpan graviton sur la dekstran kalkanon. Levu la maldekstran piedpinton kun la kalkano sur la planko (Bildo 33).

4. Metu la maldekstran piedpinton sur la plankon. Faru unu paŝon antaŭen per la dekstra piedo. Faru la samon per la maldekstra piedo kun la piedpinto unue metita sur la plankon (Bildo 34).

5. Faru unu paŝon malantaŭen per la maldekstra piedo kun la piedpinto unue metita sur la

plankon kaj metu vian korpan graviton sur la maldekstran piedon. Levu la dekstran piedpinton (Bildo 35). Spiru, kiam vi faras unu paŝon antaŭen aŭ malantaŭen kun la supra korpoparto rektigita kaj la okuloj rigardantaj antaŭen aŭ antaŭenmalsupren. Ĉiufoje vi devas levi la piedpinton aŭ kalkanon laŭeble alten, por ke la suroj kaj kalkanaj tendenoj estu streĉitaj.


Faru reguligadon laŭ la movoj montritaj en "20 Sanigaj Ekzercoj" de n-ro 1, 1997.




31



32



33



34



35

ĈINAJ METIARTAĴOJ

Chang'e flugas al la luno (Eburaj skulptaĵoj)

Eburaj skulptaĵoj, kiel tradiciaj metiartaĵoj de Pekino, prezentas florojn, insektojn kaj precipe homfigurojn. Utiligante la delikatecon kaj malmolecon de eburo, la artistoj bone reliefigis la pozon kaj senton de homfiguroj. Iliaj verkoj estas bele kaj harmonie fari-taj, parte kolorigitaj kaj tre versimilaj.

La eburaj skulptaĵoj "Chang'e Flugas al la Luno" temas pri Chang'e, edzino de Yi, heroo en ĉina mito. Ŝi ŝtele englutis la eliksiron, kiun Yi petis de diino Xiwangmu, kaj forflugis al la luno.

La metiartaĵo estas farita de la Pekina Fabriko de Eburaj Skulptaĵoj.





FOTOJ FARITAJ DE E-ISTOJ

Nebridebla printempo en Danio
de **POUL THORSEN** (Danio)



Czestochowa en printempo
de **SLAWOMIR SZYMALA**
(Pollando)

ISSN 0032-4361



世界语 《中国报道》 一九九七年第九期
(本刊代号: 二——九一五) 国内统一刊号: CN11 1339/G2